


ĈINIO



9

1995

ISSN 0032-4361

- RENKONTIĜO ĈE LA 45-JARA JUBILEO DE EPĈ
- HODIAŬAJ TIBETAJ VIRINOJ
- INVENTISTINO WANG LIANXIANG
- LA OCEANA FIŜADO DE ĈINIO EN DISVOLVIĜO



Dezerto ĉe sunsubiro

Foto de **HAS BAOGEN**

INTER NI

De la 1-a numero de tiu ĉi jaro la ĝenerala aspekto de la revuo ŝanĝiĝis, la diversaj artikoloj fariĝis pli internaciaj, tial EPCĉ iom pli ol antaŭe plaĉas al mi — la artikoloj, kiel nun, ne estu pli-ol-2-paĝaj.

La revuo, eble, estas pli legata ekster Ĉinio ol la lando mem, pro tio iom pli da artikoloj, kies temoj estos fremdaj al Ĉinio, allogos pli da esperantistoj, ekz., la 6 paĝoj de “Kurantaj Aferoj” en la lastaj 3 numeroj rilatas nur al ĉinaj okazaĵoj... ĉu en aliaj landoj ne okazas valoraj “Kurantaj Aferoj”?

Pli diversaj estas la anoncoj en “Esp-novajoj”, ili tiel reflektas la internaciecon de Esperanto. Laŭ mi, EPCĉ-abonanto de ĉirkaŭ 30 jaroj, la nuna prezentaĵo kaj la enhavo pli taŭgas.

ANDRÉ LOISEL
(Francio)

Min interesas artikoloj pri la socia vivo de ĉinoj. Lastatempe tio iomete mankis al mi. Ekzemple, kiom da laborhoroj havas la tago de ĉinaj laboristoj, oficistoj, kamparanoj? Kiom da jaroj ili devas labori por akiri la rajton de emeritiĝo? Kiel alta estas la emerita enspezo kompare al la ricevitaj salajroj? Kian asekurecon en kazo de malsano, akcidento ktp. ili ĝuas? Kiamaniere Ĉinio financas la elspezojn de emeritiĝo, de sanigaj projektoj kaj de eduka sistemo?

QUIETENSKY ERNST
(Aŭstrio)

Mi ne multe ŝatas la novajn kovrilojn de la jaro 1995. Mi preferas tiujn de la antaŭaj jaroj. En 1995 la kovrilfotoj estas tro malgrandaj kaj la ĉina mapo estas ne bone videbla.


PIERRE LATASTE
(Francio)

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 *VIRINOJ KAJ INFANOJ:*
Inventistino Wang Lianxiang
- 6 Hodiaŭaj tibetaj virinoj
- 8 *POR KOMENCANTOJ:*
"Mi tion faris por vi!"
- 9 *ESP-NOVAĴOJ*
- 10 *VOĈO DE E-ISTOJ:*
Vojaĝo en Tibeto
- 12 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Dank' al Esperanto ŝi vivas feliĉe
- 14 Intervjuo kun la ĉefrolulo de
"Hejmsopira Stelo"
- 16 Renkontiĝo ĉe la 45-jara jubileo de
EPC
- 20 *REORDIGO DE HUAIHE-RIVERO:*
Pura rivero atendata
- 24 Vizito al la 3-a Lanteksejo de Interna
Mongolio
- 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*
Pie antaŭ Namco, sankta lago sur la
monda tegmento
- 28 La oceana fiŝado de Ĉinio en
disvolviĝo
- 29 *BELECO DE ĈINIO:*
Pri la antikva Turo de Princo Teng
- 32 *EKONOMIE:*
Manko de elektro
- 33 La Bovida Fortreso sur montosupro
- 34 Anĵi, gubernio de bambuoj
- 36 Ĉina buksoskulpturo
- 38 Xurigan, filo de la stepo
- 40 *ĈINA KULTURO:*
Pri Cizhou-bakuloj
- 42 Tabloteniso refoje impetas en Ĉinio
- 44 La ŝipisto sur Zijiang-rivero (Novelo)
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 49 Batalo kontraŭ jodomanko
- 50 *GALERIO:*
Kantanta pupo el argilo
SUR LA KOVRILO:
S-ro Chen Yuan, prezidanto de ĈEL,
kaj junaj esperantistoj dum la
te-kunveno por la 45-jara jubileo de
EPC Foto de Liu Sigong
- 2 Dezerto ĉe sunsubiro
SUR LA DORSKOVRILO:
Bondeziroj al la 45-jariĝo de EPC
(Ĉinstila pentraĵo)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Interna Mongolio (p. 24)
2. Dalian (p. 4)
3. Cixian-gubernio (p. 40)
4. Tibeta Aŭtonoma Regiono
(p. 6)
5. Luquan (p. 33)
6. Yueqing-gubernio (p. 36)



Inventistino Wang Lianxiang

de XIAO NAN

EN la 19-a de majo 1994, la unua tago de sia 10-taga vojaĝo en Ĉinio, s-ino Gertrude Mongella, la ĝenerala sekretario de la 4-a Monda Virina Konferenco de UN, konatiĝis kun iu eksterordinara virino en la ĉemara urbo Dalian.

Ŝi nomiĝas Wang Lianxiang kaj laboras kiel estrino de la direkco de la Haiwang-a Kompanio de Kemia Kurentfonto de Dalian kaj ties ĝenerala direktorino. En la kunsido, post kiam ŝi raportis pri sia laboro por provfari novtipan koloidan akumulatoron kun monda nivelo, s-ino Gertrude Mongella estis forte kortuŝita de ŝiaj invento kaj sindonemo.

Posttagmeze de la 20-a de majo, ŝi vizitis la kompanion. Ŝi deklaris antaŭ la publiko: "En la nomo de la ĝenerala sekretario de la 4-a Monda Virina Konferenco de UN, mi rekomendu s-inon Wang Lianxiang kiel reprezentanton de la konferenco kaj invitu ŝin al la centra sidejo de UN por festi ĝian 50-jariĝon en majo 1995."

Ŝi dediĉis sian skribon al Wang: "Vi realigis mian revon, t.e., konigi al la tuta mondo la forton de virinoj, ne nur kiel laborantoj, sed ankaŭ kiel kreintoj, inventintoj kaj eĉ kiel instruituloj."

Ŝiaj vortoj aludis la revolucion, de Wang pri akumulatoroj.

Ĉiuj scias, ke akumulatoro estas kontinua kurentfonto tre grava por ŝipoj, aŭtoj, k.a. En 1859 franca sciencisto Planté inventis la unuan plumb-acidan akumulatoron de la mondo kaj per tio faris grandan kontribuon al la civilizacio de la homaro. Sed en la pasintaj 135 jaroj oni ne povis forigi sulfatan nebulon kaj aliajn substancojn, kiuj naskiĝis en produktado, uzado kaj konservado de plumb-acidaj akumulatoroj kaj damaĝis la homan sanon kaj medion. Laŭ statistiko, ĉiujare miliono da homoj en la mondo mortis rekte aŭ nerekte de sulfata nebulo.

En la lastaj jaroj energi- kaj elektro-industriaj departementoj, aŭtaj kompanioj kaj akumulatoraj fabrikoj de iuj evoluantaj landoj fondis ekonomian komunumon por produkti novtipajn akumulatorojn, ellaboris long- kaj mezlongtempajn programon kun la celo anstataŭigi plumb-acidan akumulatoron kaj investis grandan sumon da mono por provfarado.

En 1992 la Internacia Plumba kaj Zinka Studgrupo okazigis kunvenon de fakuloj pri plumb-acidaj akumulatoroj kaj starigis komunumon por produkti novtipajn plumb-acidajn akumulatorojn. Ĝin partoprenis 47 mondfamaj akumulatoraj entreprenoj, pec-produktantaj fabrikoj kaj fakaj organizoj. La pago por la 4-jara esplorado atingis 19.3 milionojn da usonaj dolaroj.

Tamen, neniu atendis, ke en la tutmonda akumulatora tekniko-revolucio la unua venkinto estas ĉina virino. En la internacia akumulatora kampo ŝi estas la unua, kiu inventis novtipan komplete fermitan koloidan akumulatoron longe uzeblan, nebruleman, neeksplozeman, grandkapacitan, grandpovan, korodimunan kaj senpoluan.

En 1984 Wang hazarde vidis surŝipe, ke oni sin trovis tute en embaraso antaŭ plumb-acida akumulatoro, je tio naskiĝis en ŝi la ideo provfari senpoluan akumulatoron. Preninte el banko depozitaĵon, ŝi aĉetis 10 akumulatorojn kaj diversajn



S-ino Wang Lianxiang

kemi-industriajn materialojn. Laŭ la metodo prezentita de iu dokumento ŝi komencis esploradon pri solida elektrolito. 2 monatojn poste, ŝi sukcesis provfari la unuajn solidajn elektrolitojn, sed tiuj ĉi solidiĝis kaj rapide splitiĝis antaŭ ol enakumulatoriĝi.

Sekve ŝi absorbiĝis en studado pri fundamentaj teorioj kaj teknikoj de akumulatoro. 6 monatojn poste, ŝi denove komencis penigan provadon. Ĉerpinte la lecionojn, ŝi komencis esplori ministan lampon kaj familian ilumin-lampon.

Vespere de la Printempa Festo de 1986, kiam ŝia edzo, kiu laboris kiel estro de oceana kargoŝipo, revenis hejmen el alia lando, ĉio en la hejmege surprizis lin: en la malvarma ĉambreto regas fortaodoro de sulfata acido; sur la tabloj estas vazoj, bokaloj destinitaj por eksperimento, diversaj libroj kaj materialoj. Wang Lianxiang, en malnova lan-vesto plena de trutoj kaŭzita de sulfata acido, atenteme observas la eksperimenton, genuante apud la akumulatoro. Sur ŝiaj vizaĝoj kaj manoj estas cikatroj de brulvundoj kaŭzita de kemiaj solvaĵoj.

Antaŭe ŝia familio estis kompare bonhava. Ŝia edzo estis bone salajrita. Ili havis diversajn elektroaparatojn kaj motorciklon. Sed en nur 2 jaroj, por la esplorado Wang vendis ĉiujn havaĵojn de sia familio, inkl. de altklasaj vestoj aĉetita de ŝia edzo el aliaj landoj, kaj elspezis la tutan ŝparlokitan monsumon de pli ol 100 000 juanoj.

Feliĉe, kiam Wang enmetis en la unuan provizoran lampon koloidajn elektrolitojn, sintezitajn laŭ la recepto elektita de ŝi el milo da projektoj post dekmiloj da kalkuloj, mirakle eklumis la vitra lampglobeto sur la pinto. Ŝi do komencis eksperimentadon sur malgranda startiga akumulatoro por motorciklo kaj la malŝarĝo daŭris de 2

ĝis 12 horoj, tiel ke solviĝis la malfacilaĵoj por provfari koloidan akumulatoron.

Poste ŝi komencis provfari startigan akumulatoron destinitan por grandpovaj ŝipoj kaj aŭtoj. En la sama jaro ŝi sukcese provfaris la unuajn novtipajn koloidajn elektrolitojn, kies provuzado sukcesis en aŭtoj kaj oceanaĵ fiŝŝipoj.

La provfarado de forigilo de sulfata nebulo estis danĝera. Foje, akumulatoro eksplodis en eksperimentado. Ŝi estis faligita surteren kaj perdis la konscion. Ankaŭ ŝia filo estis vundita. Post la rekonsciigo ŝi denove komencis la eksperimentadon. La pago por la provfarado estis dekkelkoble pli alta ol la antaŭa. Ĝuste tiam la ŝtato difinis ŝian esploradon pri novtipa koloida elektrolito kiel ŝtatan scienc-esploran projekton kaj investis 4 milionojn da juanoj por tio.


En 1989 kaj 1990 ŝi sinsekve patentigis 5 inventaĵojn al la Ŝtata Patenta Administracio. Samtempe kun tio, ŝi patentigis inventaĵojn al 14 landoj kaj registris la markon Haiwang en 46 landoj.

Aprile de 1993, ŝi partoprenis en la 84-a Internacia Foiro de Inventaĵoj en Parizo kun siaj grandkapacitaj kaj komplete fermitaj koloidaj akumulatoroj kun marko Haiwang kaj gajnis la premion de la Scienca Departemento de la Franca Respubliko, la plej altan premion de la nomita foiro, per 2 gravaj inventaĵoj, t.e., novtipa koloida elektrolito honorita kiel magia lakto kaj forigilo de sulfata nebulo honorita kiel magia kovrilo, por la koloida akumulatoro kun marko Haiwang.

Ekde 1990 la inventaĵoj de Wang 5-foje partoprenis internacian foiron kaj ĉiufoje estis premiitaj per ora medalo.

Kiel inventistino, Wang Lianxiang fariĝis moderna entreprenistino pro la ekfunkciado de la komplete aŭtomata produktolinio de koloida elektrolito kun jara produktovaloro de 150 milionoj da juanoj kaj pro la fondiĝo de filiaj kompanioj en Usono, Singapuro kaj Hongkong. ■

Kontrolo de akumulatoroj



S-ino Wang Lianxiang prezentanta novtipan koloidan elektroliton



CHAI RUIKANG:

HODIAŬAJ TIBETAJ VIRINOJ



S-ino Ciren Zhuoga

RAKONTO PRI CIREN ZHUOGA

“Mi naskiĝis en 1943 en servutula familio en Shannan, Tibeto. Naskinte min, mia patrino mortis pro serioza hemoragio. Mia onklino vivtenis min. 7-13-jara, mi laboris kiel vartistino ĉe feŭda sinjoro. Ĉiutage mi devis porti akvon kaj prizorgi infanon kaj ofte ricevis baton,” diris s-ino Ciren Zhuoga, vicprezidantino de la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

Zhuoga estas elstara reprezentanto de la liberigitaj tibetaj virinoj.

En 1955 epidemio trafis ŝian hejmlokon. Ŝi propraokule vidis, ke multaj el la samlokanoj mortis de la epidemio. Ĝuste tiam la ŝtato sendis medicinan taĉmenton al ŝia hejmloko. Ŝi volonte helpis ĝin flegi gravajn malsanulojn.

“Kiel mirindaj estas la kuracistoj! Kuracite de ili, agoniantoj reviviĝis. Mia patrino ne mortus, se ŝi ricevus ilian kuracadon.” Zhuoga decidis fariĝi kuracistino estonte. Laŭ ŝia insista petado la medicina taĉmento akceptis ŝin kiel flegistinon. Baldaŭ la medicina taĉmento starigis en ŝia hejmloko la Shannan Popolan Hospitalon. Ŝi kaj aliaj junaj tibetanoj eklernis en medicina kurso. Poste ŝi studis sinsekve en la medicina fakultato de la Nordokcidenta Naciminitata Instituto kaj higien-administra fakultato de la Pekina Medicina Universitato. En la 60-aj jaroj ŝi laboris kiel kuracisto en kamparo kaj paŝta regiono; en la 70-aj jaroj ŝi gvidis la laboron starigi hospitalojn kaj epidemio-preventajn staciojn kaj kulturaj kuracistojn kaj flegistinojn en urboj kaj subregionoj. En 1971 ŝi eklaboris kiel vicestro de la Higiena Buroo de la aŭtonoma regiono kaj en 1980 kiel ĝia estro. Poste ŝi laŭplane starigis sanitarajn centrojn por virinoj kaj infanoj en subregionoj kaj gubernioj; ŝi ankaŭ ricevis pli da humanismaj helpoj de internaciaj organizoj dank’ al la reformado kaj pordomalfermo. Ĉio tio akcelis la disvolviĝon de medicino en Tibeto.

Tibetanoj amas Zhuoga. Ili diris: “Ŝi faris tiom da bonoj, kiom steloj sur la ĉielo videblaj, sed nekalkuleblaj.” Ŝi fariĝis vicprezidantino de la Tibeta Aŭtonoma Regiono en 1993, sed ŝi restas ankoraŭ tiel modesta, afabla kaj laborema. Sub ŝia gvido oni faris en Tibeto senprecedence grandskalan vakcinadon al 2.09 milionoj da homoj.

Kiel Zhuoga, granda nombro da tibetaj virinoj partoprenis en ŝtataj politikaj aferoj. Nun en la tuta aŭtonoma regiono laboras 19 000 virinaj kadroj. Tiu nombro estas proporcie granda en Tibeto kompare kun la tutlandaj virinaj kadroj, kiuj konsistigas 30.26% de la tutlandaj kadroj. Ĉiuj 6 virinaj kadroj en la registaro de la aŭtonoma regiono (provinc-nivela) estas tibetanoj. Kaj ankaŭ en la registaroj subregiona, urba kaj gubernia laboras tibetaj virinaj kadroj.

SPERTA TERKULTURISTINO

Nur en pli ol 30 jaroj la tibeta agrikulturo disvolviĝis de primitiveco al minimuma moderneco. Hodiaŭ tibetaj kamparanaj familioj ekprosperigis agrikulturon per sciencoj kaj teknikoj, pli kaj pli multe da virinoj iris sur tiun vojon.

Anzi estas sperta terkulturistino kaj la plej elstara fakulino pri kulturado de bonrasaj semoj. Komence de la 70-aj jaroj, fininte la lernadon en kurso de agrikulturaj teknikoj, ŝi kulturis ĉiujare 2 000-2 500 kg. da bonrasaj semoj por la produkta taĉmento. Ĝis 1979 ŝi kulturis pli ol 30 speciojn da eksperimentaj semoj.

Por diskonigi siajn bonrasajn semojn, ŝi provkulturis ilin sur malpli ol duonhektaro da kampoj laŭkontrakte kulturataj de ŝia familio. Ŝiaj bonrasaj semoj de sekalo kaj vintra tritiko estis sinsekve semitaj sur kampoj de kamparanoj. La semoj de sekalo “Anzi n-ro I” kaj printempa tritiko “Gabo” kulturitaj laŭ kutima sem-selektado estas plej ŝatataj de la lokaj

kampanoj. La bonrasaj semoj kulturitaj de ŝi altigis la hektaran produktokvanton de 3 000 kg. al 6 750 kg. Samvilaĝanoj diris: "Ni plej fidis pri semoj kulturitaj de Anzi." Ŝi estis elektita kiel labormodelo kaj reprezentantino de la Popola Kongreso de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Je tio ŝi diris: "Mi ankoraŭ estas kampanino kaj terkulturistino. Mi devas fari pli multe da aferoj por miaj samvilaĝanoj."

Por disvastigi praktikajn sciencojn kaj teknikojn, ekde 1988, 157 000 virinoj de la aŭtonoma regiono vizitis diversajn vesperajn kulturajn lernejojn kaj lernis en teknikaj kursoj. Plejparto de ili posedis 2 aŭ 3 praktikajn teknikojn agrikulturajn kaj brutobredajn, tio multe helpis ilin en iliaj produktado kaj riĉiĝo. Ekz., dank' al siaj sciencaj terkulturado kaj brutobredado, kampanino Ciren Baimuyi akiris riĉajn rikoltojn sinsekve en la lastaj jaroj, vendis al la ŝtato 4 650 kg. da superflua greno kaj pli ol cent brutojn. En 1992 ŝi aĉetis promenantan traktoron, per kiu ŝi gajnis jare ĉ. 10 000 juanojn. Ne forgesante malriĉajn samvilaĝanojn, ŝi memvole helpis ilin disvolvi la produktadon. Sub ŝia gvido ĉiuj familioj riĉiĝis tago post tago. En 1992 la vilaĝo fariĝis unu el la riĉaj vilaĝoj de la loko.

PROSPERO DE LA KOMERCO

Tibetaj virinoj faris grandan kontribuon al la disvolviĝo de la tibeta industrio, precipe al tiu de la metiindustrio de sia nacio.

Tapiŝo estas ne nur vivnecesaĵo de tibetanoj, sed ankaŭ ilia eleganta metiartaĵo. Tibeto havas historion

de 600 jaroj en produktado de ĝi. En Nedong-gubernio de Tibeto funkcias tapiŝo-fabriko tre fama, kies estro kaj vicestro estas fratinoj. En 1986, kiam tiu fabriko estis bankrotanta pro malbona administrado, ili transprenis ĝin kaj reformis ĝian administradon. En 1990 ili grandigis la fabrikon per pruntita mono de 500 000 juanoj kaj ĉie serĉis klientojn. En nur unu jaro la produktovaloro de la fabriko kelkoble multiĝis. Ili ne nur redonis la monon, sed ankaŭ profitis centmilojn da juanoj. Nun la produktaĵoj de la fabriko vendiĝas ne nur en Tibeto, sed ankaŭ en Nepalo, Germanio, Usono k.a. La fabriko produktas ankaŭ tapiŝojn speciale por alilandaj klientoj.

La strato Bakuo de Lhasa estas vizitata de pilgrimantoj, ĉinaj kaj alilandaj turistoj. Tiu strato longa je 600 m. ĉirkaŭas la faman Dazhao-templon. Ambaŭflanke de la strato staras budoj kaj butikoj. Tie estas la komerca centro de Lhasa kaj abundas diversaj objektoj bezonataj de pilgrimantoj, tibet-stilaj ĉiutagaj necesajoj kaj metiartaĵoj tre ŝatataj de turistoj. Pro tio multaj saĝaj tibetaj virinoj celas tiun merkaton. La 28-jara Baima estas unu el ili. Ŝi komercis 7 jarojn sur tiu strato. Ŝi vendas varojn tibet-stilajn kaj dufoje ĉiujare aĉetas varojn de la Sudorienta Azio.

GEEDZIĜO KAJ FAMILIO

Pri la geedziĝo sub la feŭda servuta sistemo la 69-jara Ciren Lamu emocie diris: "Kun tempopaso ĉio estas forgesebla, sed mi neniam forgesos la pasintecon koŝmarosimilan, en kiu mi estis servutulino."

Budoj ĉe la strato Bakuo



POR KOMENCANTOJ

“MI TION FARIS POR VI!”

de YOU XU

JUNA paro kun ĝenateco iris en restoracion kaj sidigis ĉe ronda tablo. Ili interkonatiĝis antaŭ nelonge kaj nun estis ilia duafoja renkontiĝo. Ili promenadis kelkajn horojn en parko kaj iris al la restoracio.

La junulino konsilis, ke la junulo mendu ne tro multe da pladoj, sed ĉi tiu mendis 7 pladojn kaj 2 skatolojn da kokoslakto. Ĉe la tablo la junulo ĝoje babilis jen pri tio, jen pri alio. Tute malaperis lia ĝenateco. Sed la junulino kondutis indiferece kaj de tempo al tempo demandis aŭ respondis. Post kelka tempo la junulino levigis, dirante, ke ŝi volas telefoni. Post ŝia foriro la junulo senzorge rigardis ĉirkaŭen kaj vidis, ke paro da geamantoj sidas ĉe najbara tablo plena de pladoj, dum la viro fumante jetis al li malestiman rigardon.

La junulo sentis honton. Li vokis la servistinojn kaj mendis pliajn 7 pladojn kaj 2 glasojn da biero. Kiam li ekfumis, la junulino revenis post la telefonado.

Kiam la junulino rimarkis, ke sur la tablo aperis aliaj pladoj, ŝia rido malaperis, dum la junulo radiis de ĝojo kaj kontento.

“Prenu!” la junulo afable proponis al la junulino.

“Kial vi volas tiel multe da pladoj?” demandis la junulino.

“Mi ne ŝatas, ke ni estu tro modestaj,” venis lia

respondo.

La junulino rigardis la najbaran tablon kaj tuj komprenis.

“Ni prenas nian tagmanĝon. Kian rilaton tio havas kun aliaj?” La junulino fiksas sian rigardon sur la junulo.

“Malpli da pladoj humiligas nin,” la junulo diris per mallaŭta voĉo. “Mi tion faris por vi!”

“Aĥ...” la junulino kapneis kun bedaŭro.

La junulo stuporigis.

Post la pagado la junulo kun ĝenateco eldomiĝis, sekvante la junulinon. Ŝi elpoŝigis kelke da 100-juanaj biletoj kaj enmanigis ilin al la junulo, dirante: “Mi ne volas, ke vi multe elspezu por mi.”

Tion dirinte, la junulino sin direktis al taksio ĉe la strato kaj tuj enŝovis sin en ĝin. Pum! — fermiĝis la pordo.

“Pro kio? Pro kio?” la junulo piedbatis kaj diris kun nekomprenemo. ■



La gepatroj de Ciren Lamu estis servutuloj. Ŝi naskiĝis en Sanglin kaj estis denaska servutulino apartenanta al feŭda sinjoro. En la aĝo de 12 jaroj ŝi estis kondukita de li en alian lokon. De tiam ŝi ne plu vidis siajn gepatrojn.

En 1951 la 25-jara Ciren Lamu kaj iu juna servutulo de alia feŭda sinjoro enamiĝis unu al la alia kaj ŝtele geedziĝis. Post nelonge ŝi gravediĝis, pro tio ŝi ĝojis kaj ankaŭ timis, ĉar ili ne havis geedziĝan liberecon. Ŝian edziniĝon devis decidi ŝia feŭda sinjoro.

Rimarkinte tion, la feŭda sinjoro forkondukis ŝian edzon. Graveda, ŝi ankoraŭ laboris de mateno ĝis vespero kiel kutime. En bovstalo ŝi naskis filon, ankaŭ kiu estis denaska servutulo.

Kelkajn jarojn poste, ŝi reedziniĝis al alia servutulo de sia feŭda sinjoro. Informiĝinte pri tio, la lasta decidis vendi ŝian duan edzon. Dank' al tio, ke laborgrupo de la demokratia reformado de la popola registaro venis en ŝian hejmlokon, ŝia dua familio ne estis detruita. Poste oni distribuis al ŝi loĝejon kaj agrojn. Ŝi fariĝis labormodelo.

La nunaj tibetaj gejunuloj havas liberecon de amo. En festaj tagoj multaj geamantoj ekskursis al an-

taŭrbo. Diplomiĝinte el universitato, f-ino Yangjin enamiĝis al junulo de kamparana familio. Sed ŝiaj gepatroj malkontentis kaj esperis, ke ŝi edziniĝos al iu alia. Ŝi insistis: “Plej gravas, ke ni ambaŭ havas sinceran amon.” Tiel ŝiaj gepatroj aprobis ŝian amaferon.

Ĉar la leĝo difinis, ke la viroj kaj virinoj estas egalrajtaj, pli kaj pli multaj tibetaj virinoj havas laboron. Memstaraj ekonomie, ili altigis sian pozicion en la familio. En pli kaj pli multaj familioj la geedzoj kune mastrumas la financan aferon, kune faras la hejmlaborojn kaj kune edukas la infanojn. Iu laboristino diris: “Mi estas tre kontenta, ke mia edzo ĉiam interkonsiliĝas kun mi pri io kaj alio kaj faras kune kun mi la dommastrumadon.” Iu juna laboristo de tapiŝo-fabriko en Lhasa diris: “Mia edzino estas kapabla kaj havas sian propran vidpunkton. En nia familio ni agas laŭ tiu, kiu pravas.”

La hodiaŭaj tibetaj junulinoj klerigitaj ne nur strebas al la feliĉa familia vivo, sed ankaŭ deziras sukceson en sia kariero. ■

ESP-NOVAĴOJ

● La 8-an de aprilo 1995 okazis en la Fuzhou-a Kultura Domo la fondkunveno de la Fuzhou-a E-Asocio, kiun ĉeestis 112 personoj. S-ro Zhu Mingyi, vic-ĝenerala sekretario de la Ĉina E-Ligo, veturis al la loko por gratuli la asocion en la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de "El Popola Ĉinio", la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj la redakcio de "La Mondo". La Sanming-a kaj Yong'an-a E-Asocioj de Fujian-provinco sendis delegitojn al la kunveno, kiun ĉeestis ankaŭ respondeculoj de koncernaj institucioj de la urbo Fuzhou.

En la kunveno oni aprobis la statuton de la asocio, starigis la konsilantaron kaj elektis s-ron Jiang Yunlin kiel prezidanton de la asocio kaj s-ron Chen Demin, direktoron de la Fuzhou-a E-Kolegio, kiel ĝiajn vicprezidanton kaj ĝeneralan sekretario.

16 infanoj de la infangardeno "Verda Ĝermo" sub la Fuzhou-a E-Kolegio donis Esperantajn salutvortojn flujajn kaj klarajn.

Okaze de la fondiĝo oni ricevis 43 gratulajn leterojn el diversaj lokoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

(Zhu Mingyi)

● Sankciite de la Kultura kaj Eduka Buroo de Lubei-distrikto de la urbo Tangshan, la Lubei-a Korresponda E-lernejo por Blinduloj fondiĝis en Tangshan novembre de 1994 kaj komencis varbi lernantojn en la tuta lando, por ke pli multe da blinduloj lernu Esperanton. Ĝia instruisto estas Fan Dongsheng. Samtempe oni eldonas la trimestran revuon "Fenestro de Animo" en brajlo.

● Ĉe la strato Zengguanglu de Haidian-distrikto, Pekino, funkcias restoracio Zirui, sur kies ŝildo okulfrapas la vorto "Esperanto" kaj verda stelo.

La mastro de la restoracio nomiĝas Kuang Hua. Li kaj lia edzino estas fervoraj esperantistoj kaj partoprenis la 71-an UK en Pekino. S-ro Kuang esprimis, ke li volonte servigos sian restoracion por aktivado de pekinaj esperantistoj, konigos al eksterlandaj esperantistoj la ĉinan dietan kulturon kaj kontaktiĝos pere de Esperanto kun tutmondaj amikoj.

Estonte en la restoracio funkcios Esperantista Salono kun Esperanta menuo kaj esperantistinoservistinoj por ke la restoracio havu veran Esperan S-ano Kuang Hua (maldekstre) kaj pekinaj esperantistoj antaŭ la restoracio



tan trajton.

La restoracio kun Esperanta signo estas unika en Pekino.

● Tutmonda Esperantista Junulara Organizo estas konata per sia mallongigo TEJO kaj traduko de sia nomo angl- kaj franclingven en la junulara medio en Eŭropo. TEJO partoprenas la kunlaboron inter internaciaj junularaj organizoj en la Eŭropa Kunordiga Buroo kaj havas kontaktojn kun la junulara fako de la Konsilio de Eŭropo. TEJO nun plivastigas siajn kontaktojn per membreco en la Junulara Forumo de la Eŭropa Unio. TEJO akceptiĝis kiel membro kun granda majoritato en la Ĝenerala Asembleo de la Junulara Forumo en Parizo, inter la 31-a de marto kaj la 2-a de aprilo. La Junulara Forumo estas organizaĵo jure sendependa, sed tute financata de la Eŭropa Unio. TEJO fondis Eŭropan Oficejon en Bonn (TEJO-Eŭropo, Rheinweg 15, D-53113 Bonn, Germanio), kie volontule laboras junuloj loĝantaj en Bonn.

(Anna Margareta Ritamäki)

● Islanda Esperanto-Asocio eldonis vidbendon "Tero el maro", prezentantan erupciojn. La prezo ĉe IEA estas 60 NLG, plus sendokostoj. Interŝanĝo ankaŭ eblas laŭ antaŭa interkonsento. Adreso de IEA: PK. 1081-121 Reykjavik Islando.

(Hallgrímur Saemundsson)

● Por kompletigi eldonon de libro pri ĝemeloj en Esperanto, oni serĉas: fotojn de ĝemelaj beboj aŭ infanoj (kun iliaj nomoj kaj landnomo), strangajn rakontojn pri ĝemeloj, artikolojn pri la temo, kiu povas interesi legantojn, specialajn leĝojn pri graveco en via lando, specialajn varojn aŭ ilojn por ĝemeloj, la vorton "ĝemeloj" en via nacia lingvo, sendu ilin al: TAKE-Esperanto-konkurso "Ĝemeloj", Rue du Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim, Francio. Fakso: 89794333. Limdato: 1995-07-31 (pro ferioj prokrastita ĝis 1995-09-30) La komisiono de TAKE elektos 5 gajnintojn. Ĉiuj aliaj respondantoj ricevos ion de Francio.

(Michel & Marie-Jeanne Basso)

● En januaro 1995 Martinus Instituto, Kopenhago, Danio, eldonis novan revuon KOSMOS en Esperanto por informi pri la kosmologio de Martinus. Ĝi aperos 4 fojojn jare. En la Instituto en Kopenhago kaj ĝia instrucentro en Klint okazas kursoj Esperantaj. Adreso: Martinus Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Frederiksberg, Danio.

(Poul Dyrholm)

● Marte aperis la 1-a numero por 1995 de 32-paĝa revuo por lernantoj de Esperanto — Juna Amiko. La jarabono estas 16 NLG ĉe la libroservo de UEA aŭ 60 SEK ĉe ILEI (B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio). Interesatoj petu abonilon kaj specimenon de Juna Amiko, pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario.

(Stefan MacGill)

Vojaĝo en Tibeto

RAYMONDE kaj ROBERT GODE (Francio)

La vojaĝgrupon konsistantan el 21 personoj (11 el la Franca Instituto de Petrolo kaj 10 ekster FIP-anoj) organizis kaj gvidis franca esperantistino Zorka ENIZAN kaj ĉina junulo Huo Yizhou (Richard) pere de la turisma servo "Peace Tour", de la 26-a de aŭgusto ĝis la 22-a de septembro 1994. Estis 7 esperantistoj en la vojaĝgrupo, kiu turisme vojaĝis al Tibeto, Sichuan, Yunnan kaj Guangxi. Pri tiu vojaĝo ges-oj Raymonde kaj Robert Gode verkis jenan artikolon.

La Red.

KVANKAM en 1983 ni jam vizitis la jenajn urbojn: Pekino, Datong, Xi'an, Ŝanhajo, Guilin kaj Kantono, ni decidis refoje vojaĝi al Ĉinio en 1994 kun triobla intereso: unue, konstati la ŝanĝojn en la regionoj, kiujn ni jam vizitis antaŭ 10 jaroj, malkovri novajn regionojn: Tibeto, Sichuan, Yunnan kaj Guangxi, kaj renkonti dum kelkaj domaĝe mallongaj momentoj nian amikon Ni Dongyang, kun kiu ni korespondas regule de 1983.

Ni atingis Pekinon sabaton. Post dutaga restado en Pekino ni ekvojaĝis al Tibeto, ĉefa punkto de nia vojaĝo. Transfluginte neĝkovritajn montpintojn pli ol 7 000 metrojn super la marnivelo, ni ekvidis sube sablajn dunojn, senkreskajn nudajn terenojn kaj la riveron Yarlung Zangbo. Ni alteriĝis sur la aerodromo Gonggar je 90 km. de Lhasa. Tie nin atendis buso, per kiu ni veturis al Lhasa. La buso rapidis laŭ la riverego. Post duonhora veturado ĝi subite haltis, defalo de sablo obstrukcis la vojon. Ni devis atendi buldozon por niveligi la vojon, por ke la busoj kaj kamionoj daŭrigu sian vojon. Tio tamen permesis al ni pli bone ekzameni tiean pejzaĝon. Post unu horo ni forlasis Yarlung Zangbo kaj alvenis al la hotelo "Holiday inn", kie la direktoro bonvenigis nin, donacante al ĉiu el ni blankan tradician koltukon, nomatan en Tibeto "khata"; ĝi estas la simbolo de amikeco. Nia hotelo estas okcident-stila, moderna, luksa. Ĝi estas preskaŭ urbeto! Nin servis junaj atentemaj stilplenaj tibetanoj, kiuj priatentis ĉiun nian geston. Ni estis ravitaj kaj pensis: "Sed tio ne estas Tibeto!"



Francaj turistoj antaŭ la monaĥejo Drepung

Ĉiĉerono klarigis, ke ni troviĝas je alteco de 3 680 metroj super la marnivelo, kaj atentigis nin pri la ĝenoj pro la alteco: moviĝu malrapide, evitu tro krutajn ŝtuparojn, trinku pli da akvo, ne trinku alkoholaĵojn, ripozu ktp... Post duhora siesto ni vizitis Norbulinka, kiu estis ekkonstruita en la 40-aj jaroj de la 18-a jarcento kaj poste fariĝis somera palaco de Dalai-lamaoj. Ĝi estas eta kaj ĝiaj muroj estas bele ornamitaj per pentraĵoj. Interne ni trovis kelkajn signojn de modernismo: radio, gramofono, banĉambro. Belegaj "Tangkas" kun sanktaj pentraĵoj sur silko aŭ riĉa ŝtofo pendas en la tronsalono. Multaj malaperis dum la detruado de monaĥejoj fare de ruĝaj gvardianoj. Iuj el ili jam reaperis inter la antikvaĵoj ege multekoste vendataj. En Tibeto (same kiel alie en Ĉinio) oni ne rajtas foti interne de temploj, sed se oni konsentas pagi 20-30 juanojn por ĉiu foto, oni ricevas la permeson. Post nia reveno al hotelo nian atenton kaptis la suna bolilo: Lhasa profitas akceptan sunradiadon kaj tiamaniere oni kaptas la sunan energion.

La tibeta budhismo rezultas el la kunagado inter la india budhismo fondita en la sesa jarcento a.K. kaj antikva tibeta religio. Budhismon venigis al Tibeto reĝo Sunzamkampo en 605-650. Li edziĝis al du princinoj fervoraj al budhismo, unu el Nepalo kaj la alia el Ĉinio. Ili ambaŭ donace alportis po unu statuon de Budho. Por ĉiu statuo la reĝo konstruis templon. Tiuj du temploj nomataj Ramoche kaj Jokhang estas la plej antikvaj en Lhasa. La reĝo tradukis la budhismajn sutrojn en la tibetan lingvon. Poste la tibeta budhismo dividiĝis en diversajn skolojn aŭ sektojn (ruĝaj kufoj kaj flavaj kufoj).

La monaĥejo Drepung fondita en 1416 estas unu el la plej grandaj monaĥejoj en la mondo. Ĝi loĝigis ĉ. 8 000 bonzojn. La monaĥejo Sera estas ankaŭ la monaĥa universitato, kiu iam povis instrui pli ol 5 000 bonzojn. Ni ĉeestis la kvalitecan debaton inter la junaj bonzoj. Tiaj debatoj akriĝas ilian intelekton kaj estas vivoplenaj, ege bruaj, ĉiu

starigita demando estas akcentita per klakado de manoj. Ni vizitis ankaŭ la templon Ramoche, la plej antikvan restaŭritan lastatempe. En ĝi ni vidis vicaron de preĝ-radoj, kiujn oni turnas pasante.

Finfine ni venis al la mirinda Potala-palaco, kies majesteco atestas la tibetan arton kaj kiu ne suferis dum la detruado de la Kultura Revolucio, dank' al, laŭdire, Zhou Enlai. Hodiaŭ Potala estas protektata de Unesko. Ĝi estas konstruita inter 1645 kaj 1694 el ligno, tero kaj ŝtonoj, sin apogas ĉe monteto, altas je 117 metroj, konsistas el pli ol 1 000 ejoj kun 20 000 statuoj kaj estas tre fortika. Ĝi funkciis kiel vintra rezidejo de Dalai-lamaoj ĝis 1959. La ruĝa parto servas al la religio kaj konservas restaĵojn de 8 Dalai-lamaoj; ĉiu stupao en ĝi estas kovrita de ornamaĵoj: diamantoj, perloj, turkisoj ktp. La blanka parto de Potala servas al administrado.

La plej respektata templo estas Jokhand, kiu datiĝis de la 7-a jarcento. En unu kapelo estas statuo de Ŝakjamunio, alportita donace de princino Wencheng el Chang'an, ĉefurbo de Tang-dinastio. Ĉirkaŭ la centra korto, kie kantis kaj preĝis multnombraj bonzoj antaŭ la kandel-lumiloj kun poefaga butero donacita de pilgrimantoj, malkovriĝas kapeletoj kun orumitaj tegmentoj. Multnombraj pilgrimantoj sterniĝis ekster la templo, antaŭ la enirejo. Elirinte, ili turnis sin laŭ la strato Barkhor, kiu ĉirkaŭas la templon, ĉiam sekvante la direkton de hor-montrilo. Tiu strato estis plena de pilgrimantoj el ĉiuj regionoj, turistoj kaj nekalkuleblaj komercistoj. La komuna punkto de ĉiuj temploj escepte de kelkaj variadoj estas ilia arkitekturo, ilia plano, sanktaj kapeloj ĉirkaŭ la centra korto, unu salonego subtenata per fostoĵoj, miloj da statuoj de diversaj budhoj.

Preskaŭ ĉie en Tibeto ni renkontis hundojn. Kial tiom da hundoj troviĝas ĉirkaŭ kaj en la kortegoj de la monaĥejoj? Tibetanoj kredas, ke la hundoj estas la reenkorpiĝo de la bonzoj, kiuj ne plenumis siajn devojn kaj estis kondamnitaj reveni al la lokoj, sur kiuj ili antaŭe vivis por elteni punojn kaj meriti la pardonon.

Ni forlasis Lhasa kaj iris al Xigaze, urbo de Bainqen-lamaoj. Survoje ni vizitis Gyaze, tipe tibetan urbon. Ni trairis etajn torentojn, tri montpasejojn kaj lagon similan al skorpio, ĉe kies bordo ni tagmanĝis. Loĝantoj alportis al ni varman akvon, por ke iuj el ni povu tamen trinki francan kafon*.

En vilaĝoj ni vidis domojn ĉirkaŭitajn de muroj, sur kiuj sekigis platkukoj el poefaga fekaĵo, kiujn oni uzas por hejtado aŭ kuirado. La domaj tegmentoj estas plataj, ĉe la anguloj flirtis multkoloraj rubandoj nomataj "ĉielaj ĉevaloj". Ilin ni

vidis ankaŭ sur la montpasejoj, tamen tie ili indikas montpinton. Malantaŭ ni estis pintoj kovritaj de neĝo. Ni troviĝis en la montaro Himalajo. Post iu montpasejo nin atendis surprizo. Nia buso, kiu ĝis tiam trairis ĉiujn delikatajn pasejojn dank' al nia sperta ŝoforo tibetana, fariĝis nemovebla en la lito de iu eta torento. Ĝi moviĝis nek antaŭen, nek malantaŭen. Iu knabo 9-10-jara transportis ŝtonojn por helpi la ŝoforon, sed vane. Finfine, verda kamiono alvenis kaj pere de dikega ŝnuro tiris nian buson sur la vojon.

Ni fine atingis Xigaze, rezidejon de Bainqen-lamao la 10-a, kiu ekzercis religian povon kaj forpasis en 1989. Oni serĉas nun lian anstataŭonton. Pilgrimantoj povas vidi multnombrajn fotojn pri li en Zashilunbu-monaĥejo. Ĝi estis konstruita en 1447 kaj konsistas el tre belaj konstruaĵoj: granda halo 30 metrojn alta kun statuo de Budho de Futuro (Majtrejo), el bronzo ornamita per juvelŝtonoj kaj kelkaj tombaj temploj de Bainqen-lamaoj. La ĉina registaro partoprenis en la ege altekosta rekonstruado de la 4-a stupao de 1990 ĝis 1993, en kiu oni loĝigis restaĵojn de 6 Bainqen-lamaoj.

Ni pensas, ke la vivo en la alteco estas peniga, eĉ kiam oni kutimas al ĝi. Ni iafaje komparas la tibetanojn al la indianoj, kiuj vivas sur la altebenaĵoj, 4 000 metrojn super la marnivelo, en Peruo kaj Bolivio. Jam de jarcentoj unuj kiel aliaj vivas solece, fidelaj al veraj propraj religioj kaj tradicioj. Ekvilibro sin instalas inter iliaj vivmaniero kaj ĉirkaŭaj vivkondiĉoj. Neeblas transsalti generaciojn kaj sin adapti dum mallonga tempo al novaj rapidegaj ŝanĝoj. Nia unusemajna restado sur tiel limigita teritorio de Tibeto ne permesas al ni finjuĝi pri tia regiono, kiu, malgraŭ ĝia malfermo al turistoj, laŭ ni, devas konservi sian identecon. La kultura riĉeco de la mondo estas la rezulto de la diverseco. ■

*Temas pri kafo, kiun francoj kutime trinkas post tagmanĝo aŭ vespermanĝo.

Feriantoj



Dank' al Esperanto ŝi vivas feliĉe

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de LI CHUNGENG



S-ino Shi Xueqin instruas Esperanton.

PRINTEMPE de 1982 en la urbo Zhenjiang, Jiangsu-provinco, iu 19-jara knabino triafoje enhospitaliĝis pro kormalsano. Ŝi estis zorgeme kuracata dum longa tempo, tamen ŝia malsano ne mildiĝis. En ŝia vivo ne estis ĝojo, nek espero. Larmoj ofte inundis ŝiajn okulojn. Ŝi ofte veis en si mem: “Kial la vivo estas tiel maljusta por mi? Kial ĝi tiel turmentas min, malfortan knabinon? Ho, min savu!”

Ŝi nomiĝas Shi Xueqin. En la floro de la juneco ŝi deziris vivi gaje kiel aliaj knabinoj, sed la realo estis kruela. Ŝi devis resti en la lito.

Itutage ŝia amikino informis al ŝi, ke la Zhenjiang-a E-Asocio varbas lernantojn por elementa kurso de Esperanto. Ŝi do decidis sin anonci por

lerni en ĝi, tamen la kurso jam ĉesis akcepti. Dank' al ŝia persistema petado, funkciuloj de la asocio kontentigis ŝian peton. De tiam ŝi estis kuracata en la hospitalo tage kaj elglitis el la hospitalo vespere por iri al la kurso. Iu-vespere ŝin subite atakis anhelado. Ŝiaj kamaradoj tuj portis ŝin al la hospitalo por urĝa savado. Informiĝinte pri ŝia studo, la kuracistoj estis surprizitaj kaj emociitaj. Ili faris ĉion eblan por savi ŝin. Post kelktaga kuracado ŝi liberiĝis de la danĝero.

En la sekvanta jaro ŝi partoprenis en alia E-kurso. Esperanto ne povis kuraci ŝian malsanon, tamen havigis al ŝi kuraĝon kaj fortojn en la vivo. Rememorante la pasintajn, ŝi diris: “Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ nobla idealo. Kiel bela rozo

Franca esperantistino Zorka Enizan kaj
Shi Xueqin en Pekino en 1992



S-ino Shi Xueqin, ŝia edzo kaj ilia filo
Foto de **WANG HANPING**



S-ino Shi Xueqin kaj ŝia edzo (dekstre) en Esperanta studrondo de Zhenjiang



en la dezerto, ĝi alportis al mi esperon en la vivo.”

En la unuaj tagoj de sia lernado de Esperanto, ŝi estis multe helpata de aliaj esperantistoj, inter kiuj estis junulo Yin Shukang, kiu eklernis nian lingvon en 1981. En la kuna lernado ili fariĝis intimaj gemikoj. Foje Yin kun pasio petis ŝian manon, tamen ŝi tion rifuzis, ĉar ŝi bone sciis, ke ŝia malsano estas serioza. Ŝi diris al Yin, ke ŝia vivo estas kalkulata per horoj, ŝi ne volas multe ŝarĝi lian vivon kaj malhelpi lian progreson. Tiam la gepatroj de Shi kaj tiuj de Yin ne montris ĝojon pri tiu amafero, tamen Yin ne ŝanceliĝis. Li diris al la knabino: “Via sanstato ja ne estas bona, tamen ni havas komunan lingvon kaj ni devas tion alte taksi.” Li amis ŝin kiel antaŭe. Ili ofte kune lernis kaj verŝis la koron unu al la alia, kio multe pliigis ilian reciprokan komprenon. Finfine ŝi akceptis lian amon. Rememorante tion, Yin Shukang diris: “Tiam ŝi estis malforta knabino en la vivo. Mi pensis, ke mi kapablas helpi ŝin. Se mi sukcesos savi iun homon, mia vivo fariĝos pli signifa.” Helpate de Yin, ŝi poste lernis en komerca lernejo.

En 1986 Yin Shukang kaj Shi Xueqin geedziĝis. Post du jaroj naskiĝis ilia filo Yin Jun. Ĝenerale, virinoj, suferantaj de grava kormalsano, ne devas gravediĝi, nek naski, ĉar tio estas tre danĝera. Sed, la filo sana naskiĝis, kaj plie la nasko multe mildigis ŝian kormalsanon. Bone prizorgate de la edzo, Shi fariĝis pli kaj pli sana. De tiam ŝi ne plu kuŝis en hospitalo pro kormalsano.

En 1991 s-ino Shi Xueqin veturis al Pekino por daŭrigi sian lernadon de Esperanto. La unu-jara lernado multe levis ŝian lingvonivelon. Tiujare s-ro Yin sola prizorgis la hejmon kaj la filon. Esperanto donis al Shi kuraĝon kaj esperon en la persona vivo, kaj pli ĝuste, estas s-ro Yin, kiu alportis al ŝi feliĉan vivon.

Ŝi diris: “La vivo estas justa. Ĝi donis al mi bonan edzon kaj ankaŭ amindan filon. Mi estas feliĉa.”

Nun Shi Xueqin laboras en la lakta kompanio de la urbo Zhenjiang, dum ŝia edzo en la urba poŝtofiĉejo. Ilia fileto lernas en la elementa lernejo. Ilia loĝdomo estas larĝa kaj hela. Post vespermanĝo ili kune aŭskultas Esperanto-radioelsendon, legas aŭ ludas vejĉion aŭ ĉinan ŝakon.

S-ro Yin Shukang nun estas ĝenerala sekretario de la Zhenjiang-a E-Asocio. Por Esperanto li kontribuis multe. Ŝi estas aktiva membro de la asocio. Ekde 1993 ĉiusemajne ŝi instruas Esperanton en iu elementa lernejo duontage. Pro sia diligenta laboro ŝi estis elektita kiel avangarda instruistino de la loka eduka rondo en la lasta jaro kaj ĉi-jare la lernejo planas laborigi ŝin kiel profesion instruistino de Esperanto.

Shi Xueqin decidis dum la vivo seninterrompe propagandi Esperanton, lingvon esperigan kaj feliĉigan. ■

WANG HANPING:

Intervjuo kun la ĉefrolulo de “Hejmsopira Stelo”

EN 1980 Ĉinio kaj Japanio unuafoje kunfilmis la koloran televidan filmon “Hejmsopira Stelo”. La filmo, kiu konsistas el 4 partoj kaj daŭras 2 kaj duonan horojn, prikantas geedzan paron el ĉina kaj japana esperantistoj, kiu havis eksterordinarajn travivaĵojn. En 1937 la 24-jara japana junulino Hasegawa Teru (Verda Majo) venis al Ĉinio kaj vivis kune kun sia ĉina edzo Liu Ren, kiu studis en Japanio kaj poste revenis al sia patrujo. Post kiam la japanaj imperiistoj lanĉis militon kontraŭ Ĉinio, Verda Majo firme staris ĉe la flanko de la ĉina popolo. Post la venko de la Kontraŭ-japana Rezistmilito la geedzoj sin ĵetis en la liberigan aferon de la ĉina popolo. Ili ambaŭ mortis pro malsano en 1947.

15 jarojn post la naskiĝo de la filmo, kiam ni celebras la 50-jariĝon de la venko de la kontraŭfaŝisma milito, ni pretervole rememoras la geedzojn kaj ankaŭ la filmon, en kiu koaguliĝas la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio. Antaŭ ne longe mi vizitis sinjoron Gao Fei, kiu laboras en la Produkta Centro de Televidaj Filmoj de Ĉinio kaj ludis la rolon de Liu Ren en “Hejmsopira Stelo”. Li rakontis al mi la filmadon kaj sian konon pri Verda Majo.

Gao Fei devenis de intelektula familio. Komence de la 60-aj jaroj, diplomiĝinte el la Pekina Filma Instituto, li fariĝis aktoro kaj poste laboris en la Centra Radio-Televida Teatro por iom da tempo.

Post la normaligo de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, japana karavano, gvidata de la fama japana dramisto Iŭama Joŝiki, vizitis Ĉinion

por esplori tiujn lokojn, kie vivis kaj laboris Verda Majo, kaj verkis la scenaron de "Hejmsopira Stelo". Kiam la filmista grupo, gvidata de reĝisoro Morikai Teiĝi, venis al Ĉinio, la ĉefrolulino jam estis destinita. Ŝi estis neniu alia ol la fama japana aktorino Kurihara Komaki. Kaj en Ĉinio la japana reĝisoro elektis la altstaturan ĉinan aktoron Gao Fei kiel ĉefrolulon de la filmo.

Por pli bone kaj pli vivece reaperigi la vivon de la geedzoj, oni bezonis dialogojn en 3 lingvoj, t.e. la japana, la ĉina kaj Esperanto, kio alportis grandan malfacilon al Kurihara Komaki kaj Gao Fei, ĉar ili ne scipovis Esperanton nek la gepatran lingvon de sia partnero.

La dulandaj aktoroj energie sin ĵetis en la filmadon. Saĝa kaj ĉarma, Kurihara Komaki ĝuas grandan renom en la filmista rondo pro sia sukcesa ludo de ĉefrolo en "Hejmsopiro", "Amo en Suferoj" kaj aliaj filmoj. Dum prezentado ĉiun sian movon ŝi serioze atentis. Ĉu en hotelo, ĉu en aŭto, ĉu en paŭzo de filmado, ŝi kaptis ĉiun ŝancon diligente lerni la ĉinan lingvon. Kaj ankaŭ Gao Fei, post sia akcepto de la tasko, foje refoje legis raportaĵojn pri Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ren kaj serioze esploris iliajn pensojn kaj karakterojn. Ĉiutage li lernis la japanan lingvon kaj Esperanton kaj recitis vortojn de la rolo ĝis profunda nokto. Gao Fei bone kunlaboris kun Kurihara Komaki. Pri tio Kurihara Komaki kaj Morikai Teiĝi ege kontentis. Tamen en labor-paŭzo Gao Fei kaj Kurihara Komaki interŝanĝis pensojn nur per skribado.

En "Hejmsopira Stelo" rolis ankaŭ Asaga Yoko,

Fujioka Hiroshi kaj aliaj famaj aktoroj. Post la plenumiĝo de la filmado en Ŝanhajo kaj Chongqing, s-ro Gao Fei kaj aliaj aktoroj kune kun la filmista grupo flugis al Tokio, Hokajdo kaj aliaj lokoj por daŭrigi la filmadon.

Gao Fei tre respektas Verdajn Majojn. Li diris, ke antaŭe li ne povis kompreni, kial Verda Majo elektis la vojon plenan de tiom da malfaciloj, tamen post la plenumado de la filmo li plene ŝin komprenis. Gao Fei diris ankaŭ, ke Verda Majo kiel ordinara japanino siatempe povis senhezite stari ĉe la flanko de justeco kaj oponi kontraŭ la faŝismaj agadoj de la japanaj militaristoj, kio estas laŭdinda. Jes, ĝuste pro tio ŝi estas neforgesebla ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por aliaj pacamantoj.

La filmo, produktita de la Kontrakta Kompanio de Televidaj Programeroj de Japanio, vekis grandan eĥon post sia projekciigo en Ĉinio kaj Japanio. Precipe, la esperantistoj ĉinaj kaj japanaj estis ege emociitaj de ĝi kaj fieris pri tiel brava kontraŭfaŝisma batalantino. "Hejmsopira Stelo" iam eĉ kandidatiĝis por televidfilma premio de Usono.

La sukceso de "Hejmsopira Stelo" ebligis al Gao Fei iom post iom suriri la vojon de filmado. Kelkajn jarojn poste li rolis en kelkaj filmoj, inter kiuj estas "Frosta Nokto", adaptaĵo de la samtitola romano de la fama ĉina verkisto Bakin.

Nun Gao Fei preparas kapitalon por mem verki kaj reĝisori filmon rilate ankaŭ al Japanio kaj mem ludi en ĝi. ■

Gao Fei kaj Kurihara Komaki



POSTTAGMEZE de la 10-a de majo la redakcio de EPC okazigis tekonvenon por festi la 45-jariĝon de sia revuo. Ĝin ĉeestis ĉ. 200 esperantistoj, E-amikoj kaj ĵurnalistoj.

Kiel novico en Esperantujo kaj la plej juna raportistino de la redakcio, mi kun granda honoro duafoje ĉeestis la festkunvenon de EPC. Tiu por la 40-jara jubileo en majo 1990 okazis kvazaŭ hieraŭ, ke ĝi restas tute freŝa en mia memoro. Tiam mi, lernantino de la Esperanta kurso de la Pekina Radio-disaŭdiga Instituto, kune kun miaj samkursaninoj prezentis korean dancon al la ĉeestantoj. La Esperantaj paroloj de la reprezentantoj estis belaj kaj la programeroj prezentitaj de fremdlandaj gastoj ricevis varman aplaŭdon. Ne gravis la diferencoj de ŝtataneco, sekso kaj aĝo. La kunveno estis plena de gajeco kaj harmonio de granda Esperanta familio.

Ankaŭ ĉi-foje la celebra aktivado estis vigla. S-ro Li Naixi, iama vicĉefsekretario de ĈEL kaj emerito de EPC, la unua venis al la kunveno, je duonhoro pli frue. 87-jara, Li aspektis sana, sed estis iom surda. Li rekonis en mi unu el tiuj knabinoj dancantaj la korean dancon antaŭ 5 jaroj. Li dediĉis jardekojn al la Esperanta laboro kaj havas profundan amon al Esperanto. Li ĉiam frue venis al la kunveno de tia aktivado, en vestoj por grava kunveno.

Venis ankaŭ Chen Yuan, prezidanto de ĈEL; Chen Haosu, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj; Chai Zemin, vicprezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto" kaj la unua ĉina ambasadoro en Usono; Luo Jun, vicprezidanto de "Amikoj de Esperanto"; Fan Jingyi, ĉefredaktoro de *Renmin Ribao* (Popola Ĵurnalo); kaj aliaj. Je vido de tiuj prestiĝaj veteranoj, naskiĝis en mi admiro kaj respekto. La Esperanta afero ne estas afero de nur kel-

Renkontiĝo ĉe la 45-jara jubileo de EPC

Teksto de **SUN AIJUN**
Fotoj de EPC-raportistoj

kaj homoj, sed la komuna celo de la tuta homaro. Ĉi-jare la redakcio de EPC ricevis gratulajn skribojn de Bakin, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (ĈPPIK) kaj honora prezidanto de ĈEL; Hu Sheng, vicprezidanto de ĈPPIK; Lu Jiayi, vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso kaj honora prezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub

la Ĉina Akademio de Sciencoj; kaj Zhou Guangzhao, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Dank' al la helpo kaj subteno de amikoj de diversaj soci-tavoloj, la ĉina E-movado senĉese disvolviĝis kaj atingis grandan sukceson.

Je la tria posttagmeze s-ro Wu Xunnan, direktoro de la redakcio, anoncis la komenciĝon de la tekonveno. S-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktoro de EPC, donis

Ĉe la enirejo



parolon. Ŝi diris, ke en la pasintaj 45 jaroj EPĈ vidigis al la mondo diversajn aspektojn de Ĉinio kaj prezentis sukcesojn de Ĉinio en ĝiaj reformado kaj pordo-malfermo. EPĈ ne nur konigis Ĉinion al siaj legantoj, sed ankaŭ akcelis la interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj kaj kontribuis al la Esperanto-movado.

Kun profunda respekto ŝi karmemoris la forpasintajn ĉinajn pionirojn, kiuj sinofere laboris por EPĈ dum multaj jaroj, kaj esprimis koran dankon al ĉiuj E-organizaĵoj de la mondo, perantoj kaj legantoj de la revuo pro ilia kunlaboro kaj subteno.

Aŭguste de 1991 mi eklaboris en la redakcio de EPĈ. Tiam la ĉina E-movado jam ne tiom viglis kiom en la 80-aj jaroj kaj plejmulto de niaj legantoj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj tiuj de la Orient-eŭropaj landoj adiaŭis nian revuon pro financa malfacilo. Konsiderante tion, la redakcio starigis la Fondajon EPĈ-abono. Nemalmultaj fervoraj legantoj donacis monon por helpi nepagipovajn samideanojn. Ekde 1994 la redakcio mem distribuas sian revuon por rekte kaj bone servi al la legantoj. Krome, konforme al la situacio de refor-

mado kaj pordo-malfermo, la redakcio faras efikajn paŝojn por grandigi sian kason. En la pasintaj kvar jaroj mi propraokule vidis, ke la tuta personaro de la redakcio klopodadis en ĉiaj manieroj por disvolvi la revuon. Precipe la mezaĝaj laborantoj diligente kaj senlace laboris, kio profunde impresis min. Ilia fideleco al Esperanto kaj al ĝia nobla idealo neniam ŝanceliĝis eĉ en la malfavora situacio. Ili estas la ĉefa forto de la redakcio.

Yang Zhengquan, vicdirektoro de la Novaj-oficejo de la Ŝtata Konsilantaro, donis varmajn salutvortojn. Li diris, ke en la pasintaj 45 jaroj EPĈ efektive faris grandan kontribuon al la diskonigo de Ĉinio kaj akiris multajn spertojn ĉi-flanke. Li sugestis, ke EPĈ donu pli da atento por diskonigi elstarajn ĉinajn esperantistojn.

La parolo de Chen Yuan estis kulmino de la kunveno. Li diris, ke en la okazo de la 50-jariĝo de la venko de la monda kontraŭfaŝisma batalo ni retrorigardas la longan malfacilan vojon iritan de Esperanto, tio estas signifplena. La ĉina Esperanto-movado havas la tradicion batali kontraŭ la maljusta milito kaj faŝismaj subpremado kaj sklavigado. La pasintaj

45 jaroj de EPĈ estis plenaj de malfacilaĵoj kaj malfeliĉoj. Dank' al la helpo kaj subteno de ĉiuj flankoj de Ĉinio, la revuo finfine suriris glatan kaj larĝan vojon kaj trovis ŝaton de e-istoj de la mondo. Je la fino li emocie diris: "Ĉe la sojlo de la nova jarcento, kiam vi celebros vian kvindekjaran jubileon kaj se mi hazarde ne ekzistos, mi deziras fariĝi vento, per kies flugilo vi povos kun plezuro atingi la novan horizonton, kie regos paco, harmonio, justeco kaj ĉio bona de la homaro." Tondra aplaŭdado aŭdiĝis tra la kunveno. La ĉeestantoj deziris, ke Chen Yuan, fama ĉina lingvisto, kiu dediĉis duonjarcenton al Esperanto, sane kaj longe vivu por renkonti la novan jarcenton.


Poste fraŭlino Yu Jianchao, reprezentanto de la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia, kaj s-ro Zen Hojaŭ, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, donis salutvortojn. En la kunveno oni voĉlegis la gratulan leteron de UEA.

De 1990 ĝis 1995 etendiĝis nur kvin jaroj. Dum tiu tempo forpasis niaj pioniroj Xu Shanshu kaj Zensto, kiuj multe kontribuis al EPĈ. Mi rimarkis, ke la emeritoj el la ĉeestantoj, kiaj Zhang Qicheng, Li Naixi, Li Shijun, Ivan Ko kaj Liao Zhigen, aspektas pli maljunaj. Sed mi vidis ankaŭ junajn e-istojn, kiuj daŭrigas nian aferon. Alte levante la verdan flagon, generacioj da ĉinaj esperantistoj trapasis preskaŭ tutan jarcenton kaj marŝas al la nova jarcento.

Finigis la kunveno. Malnovaj amikoj aŭ kolegoj babilis duope aŭ triope kaj ne volis tuj disiĝi post la kunveno, dum novaj amikoj interŝanĝis adresojn por plua kontaktiĝo. S-ro Chen Yuan kaj s-ro Chai Zemin manpremis unu la alian, promesante, ke en la jaro 2000 ili renkontiĝos por festi la oran jubileon de EPĈ. Tio estas la komuna deziro de la ĉeestantoj. ■

Gaja renkontiĝo





Kunvenantoj

Veteranaj esperantistoj en la te-kunveno





En la kunvenejo



S-ro Wu Xunnan (la dua de dekstre) kaj honoraj gastoj



S-ro Chen Yuan (maldekstre) kaj s-ro Zhang Qicheng

PURA RIVERO ATENDATA

Teksto de ZHENG ZHENJIE
Fotoj de DA WEI

ZHAO Jinming, 62-jara, naskiĝis en fiŝista familio ĉe Yinghe-rivero, branĉo de Huaihe-rivero. Lia familio vivis el fiŝado jam de kvar generacioj, kaj li vagadis sur Yinghe-rivero jam dekojn da jaroj. Li rakontis al mi pri la historio de la rivero.

“Antaŭ 20 jaroj la rivero estis klara. Kiam la kluzo proksime de nia vilaĝo malfermiĝis, en nur 1/7 hektaro da baseno povis resti 4 000-5 000 kg da fiŝoj el minimume 20 specoj. Foje mi kaptis herbovoran karpon pli ol 30 kg pezan.” Je mencio pri la pasinteco liaj okuloj ekbrilis.

“Ne plu parolu pri la pasintaĵo! Konigu al la raportisto la nunan staton!” iu interrompis la maljunulon.

“En la lastaj jaroj en la riveron enfluis multe da malpura akvo mortiga por la fiŝoj. Kiel kanzono diras, *Akvo malpuras, bano neblas, fiŝoj mortiĝas, ranoj surbordas.*”

Yinghe estas la plej granda branĉo de Huaihe-rivero. Mi vojaĝis laŭ la rivero de la supra baseno al la malsupra. Mi vidis, ke la riverakvo nigras kaj sur la surfaco kun olemakuloj flosas malpuraĵoj, kaj mi flaris fiodoron jam malproksime de la riverbordo.

En Bengbu de Anhui-provinco mi informiĝis de s-ro Zhao Wujing, estro de la Akvoutiliga Komisiono de Huaihe-rivero sub la Akvoutiliga Ministerio de Ĉinio, ke 80% de la 191 branĉoj de la rivero estas pli-malpli poluitaj. Sole Yinghe-rivero enprenas en sin pli ol 400 milionojn da kubmetroj da malpura akvo ĉiujare ellasita el 35 urboj de la provincoj Henan kaj Anhui. En la ordinara jaro la flukvanto de la rivero estis 4.67 miliardoj da kubmetroj kaj en seka jaro — malpli ol 1.5 miliardoj da kubmetroj. Estas neimageble, ke fiŝoj kaj salikokoj povas vivi en tiom malpura rivero.

Kiel stas la lagoj Hongze, Weishan kaj Luoma kaj Shilianghe-akvokonservejo, konataj kiel bazoj de akvoproduktaĵoj?

Hongze, la kvina granda sensala lago de Ĉinio, abundis je fiŝoj kaj salikokoj. En la 50-aj jaroj ĝi

produktis 23.50 milionojn da kg da fiŝoj kaj salikokoj ĉiujare. En la lastaj dek jaroj malpura akvo, ellasita en la lagon, multiĝis jaro post jaro. En 1993 ĝi atingis 1.2 miliardojn da kubmetroj, t.e., 52% de la malpura akvo de ĝiaj basenoj. La fiŝistoj devas kunporti sufiĉe da trinkakvo, kiam ili iras al la lago por kapti fiŝojn, alie ili suferos soifon. En multaj lokoj de la lago jam ne vivas fiŝoj pro poluo.

Antaŭe Weishan-lago estis tre ĉarma. Sed de 1987 en la lagon enfluis granda kvanto da malpura akvo, kio malprosperigis la plej grandan fiŝejon en Shandong-provinco.

Foje, 3/4 de Luoma-lago estis poluitaj, kio puŝis fiŝkaptadon en malfacilon.


Shilianghe-akvokonservejo estas pli mizera. Granda kvanto da malpura akvo torentis en la akvokonservejon, ke en ĝi eĉ nevideblas fiŝoj kaj salikokoj.

Poluado de Huaihe-rivero malutilas ne nur al la fiŝistoj, sed ankaŭ al ĉiuj bordanoj.

Iu kamparano de Fuyang, Anhui-provinco, diris al mi: “En 1994 la vilaĝanoj per malpura akvo irigaciis legomkampojn, rezulte ĉiuj plantidoj velkis, eĉ la lumbrikoj mortis.”

Malpura akvo kaŭzis pereigan atakon ankaŭ al nemalmultaj anaso-bredistoj. Printempe de 1992 kamparano Wang Baoliang de Shenqiu-gubernio, Henan-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE HUIHE-RIVERO



provinco, prunteprenis 20 000 juanojn de konatoj kaj 50 000 juanojn de banko. Per la monsumo li aĉetis 2 700 bonrasajn anasidojn kaj dungis fakulon por direkti la bredadon. Post nelonge anasidoj mortis aro post aro, kaj fine restis neniu viva.


Laŭ la statistiko de koncerna departemento, en la pasintaj dek jaroj, pro ĉiam pli serioza poluado de Huaihe-rivero, en ĝiaj basenoj okazis ĉ. 160 grandaj akcidentoj, inkl. de 30 veneniĝoj de homoj kaj brutoj, 63 fojoj de morto de fiŝoj kaj 42 nerikoltoj de grenplantoj. Tiuj akcidentoj kaŭzis nekalkuleblan perdon al industrio kaj agrikulturo. La poluita akvo endanĝerigas ankaŭ la sanon de la loĝantoj ĉe Huaihe-rivero, kaj la morbokvanto de kanceraj hepatoj kaj haŭta en iuj lokoj estas pli granda ol tiu en la nepoluitaj lokoj.

La kaŭzoj de poluado de Huaihe-rivero estas diversaj.

La baseno de Huaihe-rivero troviĝas en la duonseka musona regiono de la mezvarma zono, ĉe la transira zono de la suda kaj norda klimatoj de Ĉinio. Tie la jara pluvokvanto kaj la akvaj riĉfontoj ne estas egalaj, ĉu en tempo ĉu en spaco, ĉu inter jaroj ĉu en jaro. La akvaj riĉfontoj en la baseno de Huaihe-rivero okupas la sesan lokon el la 7 grandaj basenoj de Ĉinio kaj la pokapa akvokvanto de la loĝantoj estas malpli granda ol kvarono de tiu de la lando. La branĉoj plejparte havas ebenajn riverujojn kaj stagnas en malfluso.

Kun la ekonomia kaj socia disvolviĝo la baseno de Huaihe-rivero bezonas pli kaj pli multe da akvo, kaj tre akriĝas la kontraŭdiro inter livero kaj bezono de akvo. Malpura akvo el la industrio kaj la vivo de la urboj plimultiĝas jaro post jaro, dum la akvaj riĉfontoj malgrandiĝas. Tio estas grava objektiva kaŭzo de poluado de Huaihe-rivero.

La Zhoukou-a Fabriko de Mononatria Glutamato ne plu poluas.



En la pasintaj 40 jaroj konstruiĝis 5 000 akvo-konservejoj grandaj kaj malgrandaj en la baseno de Huaihe-rivero. Ili ludas gravan rolon en inundo-preventado, elektroproduktado kaj irigaciado, kaj samtempe ili reduktas flurapidon kaj purigan povon de la riverakvo. Tio estas alia kaŭzo de poluado de Huaihe-rivero.

Poluado de Huaihe-rivero estas terura, kaj estas nekomprenebla la sinteno de bordanoj ĉe Huaihe-rivero kontraŭ ĝi kaj ĝia reordigado. En nemalmultaj lokoj tiu sinteno ege maloportunas la glatan iradon de la reordigado. Ekz., iuj evidente kulpas pri poluado de la rivero, tamen ili ne kuraĝas konfesi tion kaj ĉiamaniere atribuas la kulpon al aliaj. Kaj tiel leviĝis plendo de la malsupra baseno kontraŭ la meza, tiu de la meza kontraŭ la supra kaj tiu de la trunko kontraŭ la branĉoj. Oni donas sian energion ĉefe al divido de respondeco, postulo pri kompenso kaj monhelpo. En iuj lokoj oni eĉ blinde starigis multajn poluantajn entreprenojn, kiaj paperfabriko, kemi-industria fabriko, kemi-sterka fabriko, tinkturejo, tanejo kaj galvanizejo. Ili ellasas malpuraĵon en la riveron senskrupule.

Vizaĝe al la ĉiam pli malboniĝanta akvokvalito de Huaihe-rivero, respondeculoj de la ŝtata mediprotekta departemento kaj la kvar provincoj ĉe la rivero fondis grupon por protekti la akvaj riĉfontojn de la baseno de Huaihe-rivero en 1988, kaj tiel plifortiĝis la reordigado, kontrolado kaj administrado en poluado-prevento de Huaihe-rivero.

Mi informiĝis, ke laŭ la plano de la provincoj, antaŭ 2000 estos starigitaj 688 reordigaj konstruoj en la baseno de Huaihe-rivero kaj 42 traktejoj de malpura akvo. 250 grave poluantaj fabrikoj estos malfermitaj. La kapitalo por la reordigo atingos 8.8 miliardojn da juanoj.

Koncernaj aŭtoritatuloj diris, ke se oni plene kaj serioze plenumos la planon, oni certe atingos la celon purigi Huaihe-riveron. ■

La estroj de Wuyang-gubernio kaj ĝia medi-protektiva buroo inspektas la traktadon de malpura akvo far paperfabriko.






Kampanoj irigaciantaj kampon apud la rivero



Fiŝista familio

Pramejo en la supra parto de la rivero






Prezentado de opero en kamparo



Vesto-lavado ĉe la rivero



BING CHUAN:

Vizito al la 3-a Lanteksejo de Interna Mongolio

APRILE de 1995, finiĝis la tempo de aliĝo al la Ĉina Internacia Foiro de Vestoj '95 en Pekino kaj ĉiuj standoj en la foiro estis menditaj. Vicdirektoro de la 3-a Lanteksejo de Interna Mongolio klarigis al respondeculo de la prepara komitato de la foiro: "Ni ĵus finis nian laboron en la Monda Foiro de Vestoj en Novjorko, tial ni malfruigis al la mendado por la pekina foiro." Li konigis la kaŝmiran koltukon kun marko Rongguan, faritan per speciala teknologio, kiu multe interesis la publikon en la monda foiro de Novjorko kaj estis mendita de multaj eksterlandaj komercistoj. La respondeculo de la foiro bone konis la serion da produktaĵoj kun marko Rongguan, ĉar en la aŭtoritata juĝado de la tutlandaj lanteksaĵoj okazinta antaŭ nelonge la fakuloj honoris la serion da navetteksitaj kaŝmiraj koltukoj 09 de marko Rongguan per la unuagrada premio. Antaŭ tio "Rongguan" multfoje estis premiita kaj eksterlandaj komercistoj ofte iris al la fabriko por mendi ilin.

Oni ne volis nuligi al tia fabriko, kia la 3-a lanteksejo, la ŝancon prezenti sin al la publiko. La respondeculo de la foiro diris, ke li traktos tion kiel

En la lanteksejo



escepton kaj faros ĉion eblan por trovi standon por "Rongguan".


UTILIGO DE LA RIĈAĴOJ

La kapraj kaŝmiroj estas altvaloraj bestaj fibroj. La jara produktokvanto de la kapra kaŝmiro en la mondo estas nur 8 000 tunoj. Ĝi produktiĝas ĉefe en Ĉinio, Mongolio, Irano kaj Pakistano, dum la produktokvanto de Ĉinio konsistigas pli ol 60% de la tutmonda, kaj tiu de Interna Mongolio duonon de tiu de Ĉinio, kaj plie ĝia kvalito estas la plej bona.

En la komenco de la 80-aj jaroj la prilaboro de kapra kaŝmiro estis postiginta en Interna Mongolio, tiam oni vendis kaj eksportis ĉefe kaŝmirajn harojn neprilaboritajn. Kaj oni ne ekspluatis ilian veran valoron, nek ilin utiligis. Tial plene ekspluati kaj utiligi la riĉaĵojn de bonkvalitaj kaŝmiraj haroj kaj transformi tiun avantaĝon en ekonomian avantaĝon fariĝis ĉefa celo de la lanteksejo en la teknika reformado. En 1984 la lanteksejo faris multajn reformojn de siaj instalaĵoj kaj en la sekvanta jaro ĝi sukcesis en provproduktado de navetteksita kaŝmira kamloto kaj similaj ŝtofoj. Ĝi provfabrikis entute 2 000 metrojn de 7 specoj, parto de kiuj eksportiĝis. Surbaze de tio la 3-a lanteksejo ellaboris novan entreprenan principon, t.e. krei siajn proprajn trajtojn de la produktaĵoj, akiri pli da profito el alta kvalito kaj disvolviĝi en la konkurenco. De tiam la navetteksitaj kaŝmiraj ŝtofoj estas pogrande produktataj kaj vendataj en la internacia merkato. En 1993 la produktokvanto de la navetteksitaj produktaĵoj jam atingis 200 000 metrojn kaj dank' al tio la lanteksejo okupas la unuan lokon respektive per produktokvanto kaj eksportokvanto inter la samspecaj produktaĵoj en Ĉinio.

Por garantii la kvaliton de navetteksitaj kaŝmiraj varoj kaj daŭre teni la konkurenccpovon en la internacia merkato, la 3-a Lanteksejo de Interna Mongolio ellaboris kompletan sistemon por garantii la kvaliton kaj faris normaron pli altan ol tiu de la ŝtato kaj metodojn pri la teknika administrado.

La rigora kontrolo de kvalito alportis bonan reputacion al la produktaĵoj en la merkatoj enlanda kaj internacia. Eĉ la entreprenantoj, kiuj ĉiam se-



Montrofenestro de la 3-a Lanteksejo de Interna Mongolio

vere postulas la varan kvaliton, havas grandan intereson pri la produktaĵoj de la 3-a lanteksejo, kaj iuj el ili faris afiŝojn por la varoj de la 3-a lanteksejo en sia propra merkato.

FAMIGI SIAJN VAROJN

En la kontakto kun eksterlandaj komercistoj la 3-a lanteksejo informiĝis, ke la internacia merkato tre interesas la navetteksitaj ŝaloj kaj koltukoj. Ĝi do organizis siajn teknikistojn en esplorado kaj ekspluato. Ĉar la koltukoj diferencas de ordinaraĵ drapaj varoj en la normo, formo, teknologio kaj stilo, tial oni renkontis multajn malfacilojn en la produktado sub la kondiĉo de malkompletaj teknologiaj bazo kaj ekipaĵoj. La teknikistoj do reformis sian teknologion en la produktado kaj, utiligante la ekzistantajn ekipaĵojn, faris necesajn reformojn kaj enkondukon de necesaj ekipaĵoj. Post duonjaro oni liveris al eksterlandaj klientoj 300 specimenojn de kaŝmiraj koltukoj kun franĝoj ĉe ambaŭ randoj. Post tio, postulate de la aĉetantoj, oni komencis esplori pri malmoleco kaj facila faldebleco de la varoj, faris kelke da gravaj reformoj kaj enkondukis de eksterlande maŝinojn por kuntorditaj franĝoj. En 1990 oni ekproduktis koltukon surhavantan ondoformajn strekojn. Dank' al progreso de la teknologio, la lanteksejo iom post iom levis la kvaliton de la koltukoj, pliigis iliajn specojn kaj tiel la de ĝi produktitaj varoj fariĝis pli kaj pli famaj en la internacia merkato. Ili nun havas grandan debiton ankaŭ en la ĉina merkato. En 1988 ĝi eksportis 4 000 koltukojn kaj en 1991 25 000 koltukojn. En la unuaj 10 monatoj de 1994 ĝia eksportokvanto de koltukoj atingis 160 000, samtempe ĝi produktis 200 000 koltukojn por la ĉina merkato. Nun la varoj kun marko Rongguan estas vendataj ankaŭ en Japanio, Eŭropo kaj Ameriko.

Nun la navetteksitaj kaŝmiraj koltukoj kun mar-

ko Rongguan havas 130 specojn kun 350 desegnoj. Ili estas fortaj en la konkurenco kun famaj markoj de la samspecaj varoj ĉu en la kvalito, ĉu en la formo kaj desegno.

FENESTRO EKSTERLANDE

Ekde sia naskiĝo la 3-a lanteksejo estas taskita je produktado de la eksportataj drapoj de la regiono. Sed antaŭe sub la planizita ekonomio la entreprenoj estis malproksimaj de la internacia merkato, kaj ili estis destinitaj nur por produktado kaj livero de la produktaĵoj al la eksterakomercaj departementoj laŭ plano. En la 80-aj jaroj kun disvolviĝo kaj profundiĝo de la reformado de la ekonomia sistemo, la malpeza kaj tekstila industrioj estis la unuaj transdonitaj al la merkato. En 1988 la nomita lanteksejo akiris rajton de importado kaj eksporto, ĝi aktive partoprenis la konkurencon en la internacia merkato kaj eksportis 500 000 metrojn da kaŝmiraj produktaĵoj entute, el kiuj ĉefe estis navetteksitaj kaŝmiraj varoj kun marko Rongguan.

En la praktiko la lanteksejo ekkonis, ke sola atendo de la eksterlandaj komercistoj aŭ provizora oficejojaĝo eksterlanden estas pasiva, kio malfruigas ilian konon pri la stato de la ŝanĝiĝema internacia merkato kaj malsamaj bezonoj de la konsumantoj. Pro la supre menciitaj faktoroj kaj aliaj problemoj en la komercaj procedoj la entreprenoj ne povis plene disvolvi sian avantaĝon kaj la avantaĝon de siaj produktoj. Por solvi tiun ĉi problemon la entreprenantoj de la lanteksejo starigis filian kompanion — Komercan Kompanion Rongguan en Novjorko, kie la komercaj kvantoj de teksaĵoj estas kompare grandaj kaj perantoj kaj detalistoj kompare multaj. Kiel eksterlanda fenestro de la lanteksejo, ĝi kreas konvenajn kondiĉojn por pliigi la eksportan kvanton. ■

PIE ANTAŬ NAMCO, SANKTA LAGO SUR LA MONDA TEGMENTO

Fotoj de JUEGUO



Pilgrimanta knabino

Survoje al la sankta lago



Preĝo al ŝtonmaso



Pilgrimantoj ĉe Namco

Tibetanoj rigardas Namcon sankta lago, kaj de printempo venadas al la lago pilgrimantoj de foraj lokoj. Ili ĉirkaŭiras la lagon por preĝi, turnante preĝ-radon en mano kaj murmurante sutrojn. Ĉe la vojo ĉirkaŭ la lago estas masoj da ŝtonoj, super kiuj pendas sutraj flagoj bluaj, blankaj, ruĝaj, verdaj kaj flavaj, kaj sur la tero estas multe da bovaj kaj ŝafaj kranioj kun sutroj. La pilgrimantoj faras rondirojn ĉirkaŭ la ŝtonaj masoj, aldonas ŝtonon aŭ pendigas longan blankan silkan rubandon omaĝe al la sanktejo, tuŝetas per sia frunto la flagojn, faras adorkliniĝojn kaj foriras en kontento.



Ĉerpi sanktan akvon por porti ĝin hejmen



La lago Namco situas 200 kilometrojn norde de Lhasa de Tibeto. Kun areo de 1 940 kvadrataj kilometroj, ĝi estas la dua granda sala lago en Ĉinio post Qinghai-lago.

La lago Namco situas 4 700 metrojn super la marnivelo, kaj kalko konsistigas la montetojn kaj duoninsulojn ĉirkaŭ la lago. Ventego kaj ondego faris la lokon tre impona karsta geomorfologio. En vintro, kiam ĉio estas tapiŝita de neĝo kaj glacio, la lago kunfandiĝas kun la ĉielo. En somero, kiam degelas la neĝo kaj glacio, la vastega lago fariĝas giganta spegulo sur la altebenaĵo.

Multaj el la pilgrimantoj banas sin en la lago. Eĉ somere la akvo ankoraŭ estas pike malvarma, kaj ili staras nur malprofunde en la akvo kaj viŝas per la akvo sian korpon. Post la bano ili kunportas hejmen botelon da akvo. Ili kredas, ke bano en la sankta lago kaj trinko de ĝia akvo povos kompensi iliajn pekojn dum la vivo kaj longigi la vivon.

ZHENG ZHENJIE:

LA OCEANA FIŜADO DE ĈINIO EN DISVOLVIĜO

EN legom-bazaroj kaj restoracioj de multaj grandaj urboj de Ĉinio ofte vidiĝas pseudosciaenoj (*Pseudosciaena crocea*) de okcidenta Afriko, salmoj de la Arkta Oceano, thunoj (*Thunnus tenggol*) de suda Pacifiko, moruoj de norda Pacifiko k.a. Tio montris la fruktojn rikoltitajn de Ĉinio en la oceana fiŝado en la lastaj 10 jaroj.

Disvolvi oceanan fiŝadon estis forta deziro de la ĉinaj fiŝistoj en multaj jaroj. Marte de 1985 la unua floto sub la Ĝenerala Ĉina Kompanio de Akvoproduktaĵoj komencis navigacion en Mawei-haveno, Fujian-provinco, kaj tiu floto el 13 ŝipoj levis la kurtenon de la oceana fiŝado de Ĉinio.

S-ro Lŭ Hongtao, vicĉefdirektoro de la ĝenerala kompanio, estis organizanto de la floto. Por sukcesi la laboron li trifoje veturis al okcidenta Afriko por fari enketadon en Gvineo-Bisao, Senegalio kaj Gvineo. Li faris tion ankaŭ en Hispanio. Li, kiu laboris pli ol 30 jarojn en la akvoproduktaĵa entrepreno, certigis, ke la maroj ĉe la afrika kontinento estas idealaj por oceana fiŝado, tial li komencis oceanan fiŝadon kun siaj kolegoj.

Por disvolvi oceanan fiŝadon la plej malfacila estas longdistanca navigacio. Ili komencis navigacion de Ĉinio kaj transiris Pacifikon, Atlantikon, la Hindan Oceanon, Sudan Ĉinan Maron, Malakan Markolon, Araban Maron, Suezan Kanelon kaj Ĝibraltaran Markolon. La floto konsistis el 150-250-tonelaj fiŝŝipoj fabrikitaj de Ĉinio. En la longdaŭra navigacio ili venkis multajn malfacilojn kaj post pli-ol-50-tagnokta veturado ili atingis la Prepara laboro


hispanan havenon Las Palmas.

Por longdistanca navigacio estas bezonata kuraĝo kaj por internacia konkurenco de fiŝado — pli grava provado. La ĉinaj ŝipanoj unuafoje venis en aliajn landojn kaj renkontis multajn malfacilojn: lingva baro, nekonado de la loka fiŝejo, tro simplaj instalaĵoj de fiŝprilaborejo k.a. Kaj plie, iuj alilandaj fiŝistoj suspektis la ĉinajn kaj ne volis konigi ilin pri fiŝfontoj kaj merkata stato, siatempe la ĉinaj ŝipanoj eĉ ne havis bezonatan marmapon, ĉio ĉi ege malfaciligis la ĉinajn ŝipanojn. Kelkfoje okazis, ke la fiŝoj kaj salikokoj, malfacile kaptitaj de la ŝipanoj, vendiĝis en tre malalta prezo, ĉar ili ne plaĉis al la lokanoj. Pro tio la ĉinoj suferis de granda perdo.

La ĉinaj ŝipanoj ne retiriĝis antaŭ la malfaciloj. Ili brave iris antaŭen. Post nelonge s-ro Lŭ kaj liaj kolegoj ekkonis la fiŝejojn kaj specojn de la fiŝoj facile vendataj en la loka merkato. Konsultante alilandajn spertojn, ili plurfoje ŝanĝis fiŝad-metodojn kaj rapide plibonigis la staton. Dank' al tio, ili sukcese akiris pozicion en la fiŝ-merkato de Gvineo-Bisao, Senegalio kaj aliaj lokoj kaj eklaboris en la fiŝejoj de Maroko kaj Maŭritanio. Konforme al la

(Daŭrigo sur p. 39)

Abunda rikolto



EN suda Ĉinio estas tri famaj turoj. Ili estas Turo de Flava Gruo en Hubei-provinco, Yueyang-turo en Hunan-provinco kaj Turo de Princo Teng en Jiangxi-provinco. Ĉi-sube mi parolu pri la origino de la Turo de Princo Teng.

Ĉiuj membroj de la imperiestraj familioj de la ĉinaj dinastioj estis turismemaj kaj princo Teng, filo de Li Yuan, la unua imperiestro de Tang-dinastio (618-627 sur la trono), ne estis escepto. Kiam li estis ŝtatoficisto en Nanchang, Jiangxi-provinco, por amuzi sin kaj regali siajn amikojn li konstruigis en la jaro 653 la altan majstre gravuritan kaj brile farbitan turon, kiu ricevis la nomon Turo de Princo Teng.

Sed fakte, estis poeto Wang Bo, kiu famigis la turon en Ĉinio. Iutage li surgrimpis la turon kaj estis ravita de la bela pejzaĝo sur la rivero en aŭtuna vespero: La vastega akvo kunfandiĝas kun la ĉielo, birdoj flugas en la vesper-rugo... Li do improviziis la belan prozaĵon sub la titolo "Pri la Turo de Princo Teng", kiu cirkulas eĉ hodiaŭ. De tiam sennombraj turistoj venis tien por ĝin rigardi. Oni diris: "Ĉiuj ĉinoj, kiuj studis la antikvan literaturon de Ĉinio, senescepte bone scias la verkon 'Pri la Turo de Princo Teng' de Wang Bo, kaj ĉiuj ĉinoj, kiuj legis la verkon, senescepte sopiras pri la turo." Precipe poetoj kaj kaligrafoj ŝatis la turon. Sur la turo ili ĉirkaŭprenis per rigardo la belan pejzaĝon, recitis belan klasikajon, improviziis pentraĵon kaj poemon. Ili postlasis multe da belaj verkoj, inter kiuj estas pli ol 1 000 poemoj.

En la pasintaj pli ol 1 000 jaroj la Turo de Princo Teng estis 28-foje detruita kaj rekonstruita. La lasta detruo okazis en 1926. Militaristoj forbruligis ĝin. En la posta duonjarcento tie estis nur restaĵo de detruita muro. Pro militado kaj manko de monrimedoj ne eblis ĝin rekonstrui.

En 1983 komenciĝis la rekonstruado de la Turo de Princo Teng kaj finiĝis post ses jaroj. Nun la nova Turo de Princo Teng staras ĉe Ganjiang-rivero. Surbaze de la strukturo de la turo, priskribita de Wang Bo en la verko, Nanchang-anoj konstruis la ĉefan parton de la turo sur granda duŝtupa teraso, kun Yajiang-kiosko kaj Yicui-kiosko ambaŭflanke, kiuj komuniĝas kun la ĉefa parto per longa koridoro.

La turo havas sep etaĝojn kun luko ĉirkaŭita de marmora balustrado. Sur

BELECO DE ĈINIO

Pri la antikva Turo de Princo Teng

Teksto kaj fotoj de DA WEI


la plej alta etaĝo oni povas rigardi mal-supren.

En la turo estas grandega reliefo el blanka marmoro kreita laŭ la antikva rakonto pri la Turo de Princo Teng; granda fresko "Eminentuloj" kun statuoj de literaturaj eminentuloj de Jiangxi en diversaj dinastioj; fresko de historiaj vidindejoj de Jiangxi; kaj la teksto "Pri la Turo de Princo Teng", gravurita sur latuna plato kun areo de 10 kvadrataj metroj.

En la okcidenta flanko de la turo staras malgranda antikvastila scenejo. Sur ĝi oni ludas klasikajn dancojn kaj

muzikaĵojn de mateno ĝis vespero.


Elirinte el la turo kaj trairinte antikvastilajn kortojn, oni alvenas al la strato de antikva kulturo. Ĉiuj antikvastilaj butikoj estas duetaĝaj. Ili vendas ekskluzive artaĵojn, kaligrafaĵojn kaj pentraĵojn. En la privataj budoj ĉe la strato vendiĝas multe da porcelanaĵoj, jadaĵoj, antikvaj moneroj, penikoj kaj inkfrotujoj, kiuj allogas amatorojn. Komprenoble, porcelanaĵoj de Jingdezhen estas plej plaĉaj al alilokaj turistoj kaj havas grandan debiton. Kaj el tio prezentigas spektaklo de la turisma kulturo de la loko. ■



Parto de la Turo de Princo Teng



La Turo de Princo Teng en nokto



En la strato de antik-
va kulturo



Ŝtona balustrado ĉe rivero



Granda fresko en la turo

Manko de elektro

de XIAO LU

INVENTO kaj apliko de elektro puŝis la homan socion en novan civilizitan etapon. Kun la disvolviĝo de la moderna civilizacio la homoj enkondukis elektron en pli vastan aplikadon. Tiuflanke Ĉinio disvolviĝis kompare malrapide. Ĉar ĝis la 60-70-aj jaroj la kamparanoj en nemalmultaj malproksimaj vilaĝoj ankoraŭ ne sciis, kio estas elektra lampo. Tamen, en la lastaj dekelke da jaroj jam populariĝis televidiloj kaj fridujoj en Ĉinio, en iuj grandaj urboj oni ekuzis ankaŭ marmiton, glaciŝrankon, klimatizilon k.a. Elektro fariĝis nemankigebla por la homoj en la ĉiutaga vivo.

Tamen, la konsumado de civila elektro ja estas malgranda, kaj la grandaj industrioj kaj vilaĝaj entreprenoj ja estas grandaj konsumantoj de elektro. Ilia bezono de elektro pli kaj pli pezigas la ŝarĝon de la elektroenergiaj departementoj de Ĉinio. Kaj rezulte de tio, ĉiam pli akriĝas la kontraŭdiro inter livero kaj bezono de elektro. Preskaŭ en ĉiuj grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio la elektraj retoj kaj instalaĵoj estas superŝarĝitaj. Kiam la problemo fariĝas nesolvebla, la sola rimedo estas malŝaltado. Kompreneble, la entreprenoj ĉesas funkcii kaj perdas multon pro malŝaltado. La popolanoj plendas, ke pro elŝaltado iliaj televidiloj kaj elektraj ventumiloj ne funkcias kaj la fiŝoj kaj viando en la fridujoj putriĝas. La uzantoj spertas ŝaltadon kaj malŝaltadon, tamen la kaŝita danĝero en la disvolviĝo de la ĉina elektra energio ne estas konata de multaj homoj.

Elektromanko de Ĉinio okazis en la komenco de la 70-aj jaroj. Nur tiam oni ekkonis la gravecon por rapidigi elektroenergian konstruadon. En la postaj pli ol 20 jaroj Ĉinio rimarkinde progresis en elektroenergia konstruado. Kaj en 1987 Ĉinio okupis la kvaran lokon en la mondo per siaj produktokvanto de elektro kaj generatora kapacito. La elektroenergia konstruado de Ĉinio leviĝis de malalta nivelo kaj Ĉinio estas lando kun granda loĝantaro, tiel la poka-pa produktokvanto de elektro de la ĉinoj egalas nur 40% de tiu de la mondo kaj okupas la 80-an lokon en la mondo eĉ hodiaŭ. Alia fakto estas, ke por la disvolviĝo de la ĉina nacia ekonomio la elektroener-

gia konstruado estas relative postiginta. De la 70-aj jaroj la kreskado de elektra energio neniam kuratigis tiun de la nacia ekonomio kaj la antaŭa egaligis nur al 0.7-0.75 de la lasta en multaj jaroj. En 1994 la elektra produktokvanto de Ĉinio kreskis je 11.3% kompare kun tiu en 1993, dum la kreskado de la totala industria produktovalorio estis je 9 procentoj pli granda ol tiu de elektra produktokvanto. Samtempe kun tio, la proporcio inter la kapacito de elektroenergiaj instalaĵoj kaj tiu de la porkonsumaj estas en ŝanĝiĝado. Por plejble kontentigi la bezonon la elektroenergiaj instalaĵoj funkcias ofte en superŝarĝo. Tio ne nur mallongigas la aplikadon de la instalaĵoj, sed ankaŭ kaŭzas al ili akcidenton.

Kio kaŭzas mankon de elektro? La ĉefa kaŭzo estas nesufiĉa investo. Precipe kiam investo de fiksa kapitalo grandkvante pliiĝis, la investa procento por elektroenergia konstruado tamen malgrandiĝis. Nun la investo por fundamenta elektroenergia konstruado konsistigas nur iom pli ol 10% de tiu de la fundamenta konstruado de Ĉinio, sed en aliaj landoj — pli ol 15%. Krome, pro tio, ke elektroenergia konstruado bezonas multe da investo kaj longan periodon, oni devas fari grandan laboron en la unua periodo de la konstruado. Bedaŭrinde, Ĉinio ne bone stas tiuflanke. En 1990 la proporcio inter la kapacito de konstruataj generatoroj kaj tiu de funkciigitaj generatoroj estis 9:1, tiu en 1991 — 5.9:1 kaj tiu en 1992 — 5:1. Tio montris, ke la nuna elektromanko estis kaŭzita iagrade de la tro malgranda skalo de elektroenergia konstruado en la pasintaj jaroj. Tio montris ankaŭ, ke en la venonta periodo la kvanto de novgeneratoraj kapacitoj de Ĉinio ne estos granda, kaj ne tute foriĝos la elektromanko.

Por rapidigi elektroenergian konstruadon, la urĝe solvenda problemo estas monkokolektado. Krom asigni multe por produkti elektron, Ĉinio ankaŭ turnis sin al aliaj landoj. En la lastaj 15 jaroj la elektroenergiaj departementoj de Ĉinio jam subskribis kontraktojn kun aliaj landoj pri investo de 14.3 miliardoj da usonaj dolaroj por konstrui 63 hidro- kaj termoelektrejojn, grandajn kaj mezgrandajn, kun totala generatora kapacito de 40 milionoj da kilovattoj. Laŭ la budĝeto de koncerna departemento, ĝis la fino de la kuranta jarcento Ĉinio importos fremdan kapitalon de 28 miliardoj da usonaj dolaroj. Nun Ĉinio serĉas novajn kunlaborantojn por altiri pli da fremda kapitalo.

En Ĉinio liverado de elektro al la gravaj ŝtataj entreprenoj kaj publikaj instalaĵoj estas garantiata. Tamen la elektroenergiaj departementoj de Ĉinio planas plifortigi la pagigan administradon de multaj entreprenoj, por ke ili adaptiĝu al la leĝo en la socio de komerca ekonomio, t.e. pagi por elektrokonsumo, ne liveri elektron al nepaganto kaj efike puni tiujn entreprenojn per malŝaltado, kiuj longtempe prokrastas pagon por elektro. Tiuj rimedoj estas necesaj por kapitala cirkulado kaj mildigo de elektromanko. ■

WANG SHIRONG:

LA BOVIDA FORTRESO SUR MONTOSUPRO



EKSKURSO post longa sidado en kabineto estas tre agrabla. En aprilo mi havis la ŝancon viziti la Bovidan Fortreson. Antaŭ ekveturo mi sciis iom pri la loko el televido kaj presaĵo, tial la vojaĝo tiklis min de pluraj tagoj.

La Bovida Fortreso estas antikva konstruaĵo sur montosupro. Ĝi situas en la antaŭurbo de Luquan, 17 km. okcidente de Shijiazhuang, la ĉefurbo de Hebei-provinco. La monto, ne alta, sed animita, ĉiam altiras al si multajn pilgrimantojn kaj turistojn. La monto estas kruta, la vojeto zigzaga, sed la montosupro estas ebena kiel teraso kaj areoj 45 hektarojn. Mirindas, ke sur la ŝtona monto estas tertavolo dika je 10 metroj. En la antikveco lokanoj kulturis la teron. Sed bovoj ne povis suriri la monton pro la kruteco, kaj la lokanoj portis bovidojn sur la monton kaj laborigis ilin post ilia elkresko. Tial oni nomis la monton Bovida Fortreso.

Mi aŭdis, ke ĉe la sunsubiro la montĉeno de la fortreso konturas sur la bunta ĉielo gigantan kuŝantan budhon. Je tio ĉiuj en la aŭto ekhuras de ĝojo: “Jes, mi vidis!” “Jes, mi vidis!” Ĉiuj fingre montris, dirante: “Jen la brovo”, “Jen la lipoj”... Ni ĉiuj vidis, ke antaŭ ni ŝakjamunio trankvile kuŝas en la lumo de la subiranta suno. La vizaĝo de la Budho konturiĝis tiel proporcie, ke ni povis klare distingi la gigantan gemon sur la frunto. Sed post kelke da minutoj ŝanĝiĝis la silueto de la montĉeno kaj malaperis la Budho. Kiam mi kaj miaj kunvojaĝantoj ankoraŭ dronis en raviĝo pro la magia kreaĵo de la naturo, la aŭto atingis la montpiedon de la fortreso.

Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj en la fortreso rilatas kun religio. Unue mi trapasis 38 ŝtupojn. Ĉe la fino de la ŝtuparo estas arkado kun tri pasejoj. Ĝi altas 14 metrojn kaj larĝas 23 metrojn kaj kvar ruĝaj kolonoj, ĉiu kun diametro de unu metro, subportas la tegmenton el flavaj glazuritaj tegoloj. Sur la arkado estas skribitaj “Suda Ĉiela Pordo”. Multaj el la ĉinaj budhismaj sanktejoj havas la konstruaĵon “Suda Ĉiela Pordo”, kaj tiu de la fortreso estas la plej granda el la samspeculoj.

Trairinte la Sudan Ĉielan Pordon, mi aŭdis belan liturgian muzikon. Mi serĉis laŭ la muziko kaj trovis, ke la muziko venis el la taoisma templo Jinquegong. Taoismo estas ĉina propra religio fondita antaŭ 1 800 jaroj. La ĉefa halo en la templo estas tiu por la Ĉiela Imperiestro. En la halo staras kvar ruĝaj kolonoj ĉirkaŭvolvitaj de oraj drakoj, kaj inter la kolonoj

estas baldakeno kaj trono por la imperiestro. Tie sidas ora statuo de la Ĉiela Imperiestro kun serioza mieno. Sur la tri muroj en la halo estas la delikata murpentraĵo “Vojaĝo de la Ĉiela Imperiestro”. Akompanate de sennombraj belulinoj kaj generaloj, la imperiestro en ceremoniaj vestoj iras per firmaj paŝoj. Ŝajnis al mi, ke la Ĉiela Imperiestro tuj eliros el la pentraĵo, se li faros unu paŝon pluen. En la solena halo piaĵ geviroj surgenuiĝis, incensis, preĝis kaj votis.

Okcidente de la halo por la Ĉiela Imperiestro estas la halo por la Luna Avo. La avo kun afabla mieno estas mita dio zorganta pri edzeco de karnuloj. De tempo al tempo li elprenas el sia poŝo ruĝan fadenon kaj ligas per ĝi paron da gejunuloj je iliaj piedoj, kaj sekve ili fariĝis geedzoj. Pli interese estas, ke ekster la ĉirkaŭmuro de la halo por la Luna Avo kreskas duobla persimono, kiu havas ankaŭ duoblan trunkon kunigitan, kiel paro da geedzoj. Tial la lokanoj nomas ĝin geedza arbo. En aŭtuno la fruktoj peze klinas la branĉojn, kvazaŭ simbolante la sekularan deziron havi eternan amon inter la geedzoj kaj multajn posteulojn.

Oblikve transe de la taoisma templo estas la fama halo de 500 arhatoj en la Bovida Fortreso. Tiu ĉi arhata halo distingiĝas per sia subtera situo. En la surtera portalo sidas eterna optimisto, ĉiam ridanta Majtrejo kun nudaj brusto kaj barela ventro. Ambaŭflanke de la budho estas po du ŝtuparoj kondukantaj subteren. Tie la arhatoj sidas en vicoj, kaj ĉiu havas antaŭ si lignan tabuleton kun sia respektiva titolo. Mi malrapide iris antaŭ ili por pririgardi. Unu el ili krucas la manojn antaŭ la brusto, iom levas la kapon kaj montras la mienon de malestimo, alia etendas la manojn, kvazaŭ petante incenson, kaj tria frotas la okulojn, kvazaŭ ĵus vekiginte el sonĝo. Ili ĉiuj havas mienojn de grimaco, kolero, oscedo, rideto kaj ridego. Tiuj arhatoj jam ne havas dignan mienon de feo, sed aspektas kiel karnuloj. Preskaŭ ĉiuj ĉinaj temploj havas arhatan halon, sed tiu de la Bovida Fortreso, ŝajne, estas la plej bona el la samspeculoj, kiujn mi vizitis.

La Bovida Fortreso estis ĉirkaŭita de nova muro en longo de du km. Komence ĝi havis ĉirkaŭmuron, sed tiu ĉi disfalis antaŭ longe. Mi venis al la plej alta parto de la muro por havi panoraman vidon. Tuj sub la muro estas krutaĵo. De la montosupro etendiĝas kamparo tapiŝita de verda tritiko kaj flava kolzo, tie kaj tie punktatas kamparanaj domoj kaj basenoj... Mi estis ravita de la bela pejzaĝo de la fortreso. ■



Bambuaro sur monto



En bazaro de bambuaĵoj Foto de CHEN HUI

Mi veturis de Ŝanhajo, granda urbo de Ĉinio, 150 km okcidenten kaj atingis Anji-gubernion, Zhejiang-provinco, faman pro siaj bambuoj. Jam en la aŭto kuranta sur la montara ŝoseo al Anji mi vidis tra la fenestro senliman verdan bambuaron ondantan laŭ la montaro.

Anji situas en la nordokcidenta parto de Zhejiang-provinco, kaj ĝia bambuaro kovras areon de 54 mil hekta-

Teĝardeno en la bambua gubernio



Anji, gubernio de bambuoj

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

roj. Ĉiujare ĝi produktas 13 milionojn da komercaj bambuoj kaj per tio okupas la unuan lokon en Ĉinio. En la gubernio iu bambua ĝardeno estas laŭdata de ĉinaj kaj alilandaj fakuloj kiel "bambua regno kun plej granda areo kaj plej multaj specioj en la mondo". Ĉie, kie mi estis, ĉu sur la monto ĉu ĉe la montpiedo, ĉu antaŭ ĉu malantaŭ la domoj de kamparanoj, kreskas densaj bambuoj. En la bazaroj vendiĝas diversaj bambuaĵoj, kiaj bambuaj benkoj, seĝoj, manĝilaroj kaj metiartaĵoj.

La Anji-anoj ekkulturis bambuojn antaŭ mil jaroj, sed komencis vastan ekspluaton kaj utiligon de bambuoj nur en la lastaj dek jaroj. Guberniestro Tan, kiu akompanis min en la vizito, diris al mi, ke post ekpraktikado de la politiko de reformado kaj pordomalfermo, oni aktive praktikas la laŭkontraktan respondecan sistemon de bambu-produktado, funkciigas vilaĝajn entreprenojn kaj faras vastan prilaboradon kaj utiligadon de bambuoj anstataŭ vendi nur bambusojn. En 1988 Anji-gubernio kaj Japanio kune fondis fabrikon de ladbambuŝosoj, la unuan en Ĉinio, kaj nun en la gubernio dislokiĝas pli ol 200 prilaborejoj de bambuoj kaj metiejoj de bambuaj artaĵoj. Ili produktas pli ol 300 specojn da bambuaĵoj, kies plejparto vendiĝas eksterlande.



Prilaborejo de bambuŝosoj

Foto de CHEN HUI

Farado de bambua mato



WANG GUILIANG:

Ĉina buksoskulpturo



S-ro Gao Gongbo en skulptado

OKTOBRE de la pasinta jaro, en la Ĉina Belarta Domo en Pekino okazis Ekspozicio de Ĉinaj Popolaj Artajoj. Inter la eksponaĵoj rigore elektitaj de diversaj lokoj la buksaj skulptaĵoj de Yueqing-gubernio, Zhejiang-provinco, vekis apartan intereson ĉe la vizitantoj. Kaj estis miriga la granda lerteco, kiun montris fama ĉina skulptisto Gao Gongbo dum sia ĉeloka prezentado. Per gravurilo li lerte skulptis versimilan homfiguron sur ordinara buksoradiko.

La buksoskulpturo estas unu el la ĉinaj tradiciaj lignoskulpturoj. Buksoj kreskas en Yueqing kaj Wenzhou de Zhejiang-provinco. Dank' al sia alta natura kvalito kaj flaveta koloro ilia ligno estas taŭga por skulptado kaj plie kun la tempopaso la ligno pli kaj pli flaviĝas kaj sentigas antikvece. Pro tio ili estas tre ŝatataj de la popolaj skulptistoj.

La ĉina lignoskulptaĵo, samkiel kolora ceramikaĵo, ŝtona kaj osta skulptaĵoj kaj aliaj tradiciaj artaĵoj de Ĉinio, havas historion de pli ol 7 000 jaroj. En la

Malpermesita Urbo de Pekino nun ankoraŭ vidiĝas iu lignoskulptaĵo farita antaŭ pli ol 600 jaroj. En la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911), la buksoskulpturo plue disvolviĝis kaj formiĝis en specialan arton kun apartaj trajtoj. En muzeoj de Pekino, Tianjin kaj Zhejiang konserviĝas buksaj skulptaĵoj Kuŝanta Belulino, Lagenarioforma Botelo, Skribilujo, Homforma Tabakujo kaj aliaj valoraj skulptaĵoj faritaj tiutempe.

En la lastaj jaroj de Qing-dinastio fama Wenzhou-a skulptisto Zhu Zichang faris multe da reformoj en la buksoskulptado. De tiam la buksaj skulptaĵoj ekhavis plurajn specojn kaj fariĝis surtablaj metiartaĵoj. Dank' al siaj bona pentrado kaj diligenta studado, li havigis al si propran skulptmanieron kaj faris skulptaĵojn versimilaj, delikataj kaj antikvecaj. Li ja estis fondinto de la buksoskulpturo kun stilo de suda Zhejiang. En 1909, liaj verkoj, kiaj Kaŝludo kaj Majtrejo kun Kvin Infanoj kun freŝa stilo, estis premiitaj en eksterlanda ekspozicio.

En 1915, liaj verkoj gajnis la duagradan premion en la Universala Foiro en Panamo. Pro tio la buksoskulpturo, bela floro en la ĉina arta ĝardeno, ekfloris ĉarme en la internacia arta kampo.

En sia disvolviĝo de kelkaj jarcentoj la buksoskulpturo formis sian propran stilon en la temo kaj arta esprimo kaj en la skulptado li ĉiam sekvis la principon unue fari decidon kaj due serĉi konvenan materialon, kio povas liveri grandan eblecon al artistoj por plene esprimi ties artan koncepton. La alta tekniko de skulpturo ja estas garantio por realigi la ideon de artistoj, t.e. buksaj skulptaĵoj estas portanto de la artefarita belo. La nuntempa fama skulptisto Ye Runzhou, kiu laboras en la Metiarta Instituto de Wenzhou, plene disvolvis sian lertecon en aĵurado kaj pentrado kaj sukcese skulptis 3 homfigurojn sur 3-kilogramma buksoligno.

La buksoskulptaĵoj temas ĉefe pri feoj kaj budhoj. La buksoligno taŭga por skulptado nepre devas esti bonkvalita kaj strikte konforma al la bezono, kio iagrade malhelpas la disvolviĝon de la buksoskulpturo. Kvankam nemalmultaj artistoj faris grandan penadon por praktiki modernan skulpturon en la formado, por havi ian kreivon en buksoskulpturo, sed ili ne sukcesis.

En la 80-aj jaroj, s-ro Gao Gongbo, kiu sin okupis pri skulpturo 30 jarojn en Yueqing-gubernio de Zhejiang-provinco, faris skulptadon sur buksoradiko kaj atingis novan sukceson. Tio faris sensacion en la buksoskulptura rondo.

Iutage interesis lin iu kurba buksoradiko firme ĉirkaŭvolvita de sovaĝaj lianoj kaj lian menson subite lumigis iu penso. Li skulptis en la supra parto de la radiko vizaĝon de maljuna fiŝisto, kiu travivis senombrajn malfacilojn, kaj en la malsupra parto de la radiko ties unu piedon. Jen versimila maljuna fiŝisto aperis antaŭ ni. Tiu ĉi skulptaĵo estis lia elstara verko kaj nun konserviĝas en la Ŝtata Muzeo de Ĉinio. Multaj liaj verkoj, kia Gaja Arhato, elspiras artan elegantecon.

S-ro Gao Gongbo estas kapabla redoni al buksoradiko ĝian eksteran belecon dotitan de la naturo. Tamen tiaj buksoradikoj kun eksterordinara formo estas malfacile akireblaj, tial li ekhavis la intencon ekspluati la internan belecon de buksoligno. Li pensis, pensadis kaj fine trovis novan metodon, t.e. tranĉi buksolignon malfacile uzeblan por serĉi ĝian internan belecon. La tranĉita ligno havas diversajn formojn kaj liniojn, kiuj multe elvokis lian kreivecon. La metodo multe plivastigis la buksoskulpturan spacon.

Generale la buksoj havas diametron de nur 10 ĝis 16 centimetroj, tial artistoj povis skulpti nur unu homfiguron sur buksoligno. Por perfektigi la buksoskulpturon nun oni aplikis ankaŭ la arton de ŝtonskulptado kaj ebura skulptado, kaj faris grandiozan buksoskulptaĵaron "Feoj Gratulas Diinon", en kiu 32 feoj varme gratulas la naskiĝtagan datrevenon de la Diino. Ĝia sukceso markis novan disvolviĝon de la ĉina buksoskulpturo. ■



Figuro de bonzo Jigong skulptita el buksa ligno



Arhato skulptita el buksa radiko

Xurigan, filo de la stepo

EN Ĉinio sterniĝas 3 milionoj da kvadrataj kilometroj da herbejoj, kiuj nutras grandan nombron da brutoj. Pro nebonaj specioj de la brutoj, la pokapa posedkvanto de viando kaj lakto de ĉinoj estas relative malgranda. Por ŝanĝi la staton la plej efika rimedo estas reformi la ekzistantajn speciojn per moderna biotekniko, nome eksterkorpa fekundigo de brutoj.

En tiu kampo Ĉinio faris rimarkindan progreson, kaj s-ro Xurigan, direktoro de la Universitato de Interna Mongolio, estas pioniro tiuflanke en la mondo.

S-ro Xurigan estas tre okupata. Tage li devas plenumi multe da laboroj en la oficejo kaj vespere kune kun siaj asistantoj fari scienc-esploradon. Iutage, mi invitive venis al lia oficejo je la 5-a posttagmeze. Mi petis, ke li koncize konigu al mi sian esploron kaj ties efikon.

Li diris, ke ĉiu eksterlanda viandobovo pezas ĉ. 1 000 kg, dum la ĉina apenaŭ 300 kg. Se oni importos bonrasajn bovidojn kaj po-grande reproduktos ilin per bioin-

ĝenieria tekniko, do grandamplekse altiĝos la pokapa posedkvanto de viando kaj lakto de ĉinoj. Tio estas memkomprenebla, tamen ne tiel facila. Al tio s-ro Xurigan oferis kiom da energio nur li mem scias.

Aprile de 1982 la Interna Mongolio sendis lin lerni en Japanio.

Tie estas eksperimentejo kun unuaklasaj ekipaĵoj de la mondo. S-ro Xurigan tute absorbiĝis en la laboro. Li senĉese progresis en sia esplorado. Iom post iom japanoj traktis tiun eruditon el la Interna Mongolio kun aparta respekto. Post nelonge iu fama japana sciencisto taskis al li la monde malfacilan temon pri eksterkorpa fekundigo de kapro, kiun li esploris multajn jarojn.

Antaŭ tio la spermatozooj de brutoj, kiaj bovo kaj ŝafo, ne havis sufiĉan forton por trapenetri ovolon ekster la korpo, kaj tiuflanke oni ne faris rimarkindan progreson. Por plenumi la taskon en unu jaro restis al s-ro Xurigan longigi labortempon, simpligi vivmanieron kaj alpreni eksterordinaran projekton. Post duonjara esplorado li elpensis centon da projektoj pri dozado de medikamento kaj denseco de spermatozooj. Iun aŭtunan nokton li kun ĝojo trovis per mikroskopo, ke la spermatozooj de kapro trapenetrus ovolojn. La plej ŝlosila paŝo de la eksterkorpa fekundigo de brutoj, t.e., per medikamento indukti kapablon al spermatozoo ekster la korpo, estis malkovrita finfine. La 9-an de marto 1984 li kaj japana doktoro Hanata Ki kune elkulturis la

unuan tubkapron Japana-Ĉina (n-ro 1) en la mondo. La biotekniko fariĝis aplikebla grava bioingenerio. La japana instruanto alte taksis tion, dirante, ke s-ro Xurigan akiris sciencan frukton kun epokfara signifo. Samtempe, s-ro Xurigan per plej alta poentaro doktoriĝis senekzemple al la japana Universitato de Veterinaroj kaj Brutobredado.

Aprile de 1984, s-ro Xurigan revenis al Ĉinio kun siaj esplorprojektoj kaj laborplano. Antaŭ li prezentiĝis multaj problemoj: Manko de eksperimentejoj, avangardaj ekipaĵoj kaj eksperimentaj bestoj.

“Konstrui eksperimentan bazon de bestoj kaj kuratingi la mondan nivelon en 5 jaroj” estis nova celo de s-ro Xurigan. La Universitato de Interna Mongolio, kie li laboras, koncerna departemento de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la Ŝtata Komisiono de Sciencoj de Ĉinio donis al li grandan kuraĝigon kaj subtenon. Komence de 1985 la prepara laboro plene komenciĝis. En julio 1986 estis konstruita la eksperimenta bazo, kun monda nivelo en la mezo de la 80-aj jaroj kaj areo de 2 400 kvadrataj metroj. Ĝi enhavis diversajn eksperimentejoj, normalan eksperimentan bestoreproduktejon, furaĝo-prilaborejon, klimatizilejon, grandan stalon kaj operaciejon.

Septembre de la sama jaro, li kaj liaj asistantoj komencis la esplorado pri eksterkorpa fekundigo de brutoj, plej fruan en Ĉinio. En 1987 ili sukcesis en eksterkorpa kulturado kaj fekundigo de la patrinaj ovoloj el bovina kaj ŝafina ovarioj. Ili publikigis disertaĵojn en enlandaj kolokvoj, kio vekis atenton ĉe la ĉinaj kolegoj. En 1988 ili tre rapide progresis en esplorado. La eksterkorpe maturiĝa, fekundigita kaj kreska procentoj de la patrinaj ovoloj el bovina kaj ŝafina ovarioj jam atingis aŭ superis la plej altan nivelon de esplorado internacia siatempe, kaj post transplantado ĉiuj ovoloj em-

Tubkaproj elkulturitaj de prof. Xurigan



briĝis. Krome, ili rikoltis serion da gravaj fruktoj en la fundamenta esplorado de la eksperimenta zoologio kaj embria inĝenierio.

Ilian trijaran penadon rekomencis la sukceso. Marte de 1989 la unua ĉina tubŝafido naskiĝis en la Eksperimenta Zoologia Centro de la Universitato de Interna Mongolio. Aŭguste de la sama jaro la unua ĉina tubbovido naskiĝis. Tio markis, ke Ĉinio jam enviciĝis inter la avangardaj landoj en tiu kampo. Tio donis al komerca embria transplantado ne nur grandan kvanton da bonrasaj kaj malmultekostaj embrioj kaj rapidigis reproduktadon de bonrasaj brutoj, sed ankaŭ sufiĉe da eksperimentaj materialoj al bioinĝenieria tekniko. Ĝi havas brilan perspektivon precipe en la kampo de genera biologio kaj brutobredado.

Por turni la eksperimentan frukton en produktan forton, s-ro Xurigan kaj lia grupo komencis novan esploron por pluaparte kompletigi la teknologion de

eksterkorpa fekundigo de bovo kaj proponis novan teknologion por pogrande produkti eksterkorpe fekundigitajn embriojn de bovo. Ili faris profundan esploron pri la eksterkorpaj maturiĝo, fekundigo kaj kulturado de ovo de bovo kaj posedis la influajn faktorojn kaj interrilatojn de diversaj paŝoj. Kaj rezulte la kreska procento de la blastulo de tubembrio de bovo restis almenaŭ 30%. S-ro Xurigan kaj liaj asistantoj rimarkinde progresis ankaŭ en fridiga konservado de la eksterkorpe fekundigitaj embrioj de bovo kaj ŝafo. Ili sukcesis en esplorado pri fridiga konservado de eksterkorpe fekundigita embrio de bovo kaj ricevis idaron de tubbovoj naskitan post fridigo, degelo kaj transplantado. Ili ankaŭ unuafoje en la mondo sukcesis en fridiga konservado de tubembrio de ŝafo kaj ricevis la unuajn fridige konservitajn tubŝafojn.

Kun la disvolviĝo kaj perfektigo de la tekniko pri eksterkorpa fekundigo de bovo, s-ro Xurigan

kaj liaj asistantoj komencis pluaparten esploron pri tiu tekniko. Samtempe kun la starigo de la eksperimentejoj por eksterkorpe fekundigita embrio de bovo eksterlande, ili starigis ankaŭ en Ĉinio eksperimentan paŝtejon por disvolvi la laborojn.

Ĉe la finiĝo de la intervjuo mi demandis al li: "La eksterlandaj kondiĉoj, ĉu financaj ĉu ekipaĵaj, estas pli taŭgaj por via kariero. Kial vi ne daŭrigis vian esploron eksterlande?" Li diris: "Mi estas filo de la stepo. Mi bone scias, ke nia lando urĝe bezonas teknikon en sia disvolviĝo. Scienco ne konas landlimon, tamen nur kiam oni staras sur sia propra teritorio, oni povas atingi veran sukceson."

Elirinte el la oficejo de s-ro Xurigan, mi estis pli konvinkita, ke kiel firmvola fakulo kaj erudito, li senĉese akiros sukcesojn kaj oni ĉiam dankos lin kiel fidelan filon de la stepo. ■

(Daŭrigo de p. 28)

ŝanĝiĝo de la fiŝataj specoj, ili alprenis sol-sejnadon, dum en Siera-Leono kaj Niĝerio ili kaptis ĉefe salikokojn per boatoj kun brakoj trenantaj retojn. La metodo multe levis la produktokvanton.

Por ke la ŝipoj entenu pli da benzino kaj veturu pli longe, la ĉinaj oceanaj ŝipoj estis provizitaj per marakvo-desaliga ekipaĵo, tiel ke oni sukcesis transformi la akvocisternon en oleocisternon kaj sekve de tio la ŝipoj povis labori pli longe. Por levi la produktivecon oni prilaboris la fiŝojn en boato kaj proviantis ilin ankaŭ sur boato, kio mallongigis la veturadon al la havenoj kaj ŝparigis la elspezon por albordiĝo. Por kontentigi la bezonon de la merkato pri specoj de akvoproduktaĵoj, s-ro Lŭ kaj lia interpretisto kune vizitis multajn fiŝbazaĵojn kaj fiŝ-prilaborejojn kaj faris enketon pri la prezo, pakado kaj prilaborado de fiŝoj. Fine ili ekhavis dosieron pri la okcidentafrikaj fiŝoj kaj surbaze de tio donis grandan atenton al la akvoproduktaĵa kvalito. Dank' al ĉio ĉi, la prezo de iliaj akvoproduktaĵoj iom post iom leviĝis. Nun la akvoproduktaĵoj de la Ĝenerala Ĉina Kompanio de Akvoproduktaĵoj estas la plej bonkvalitaj en la merkato de Okcidenta Afriko kaj laŭdataj de multaj komercistoj.

La 10-jara penado donis disvolviĝon kaj prospe-

ron al la ĉina oceana fiŝado. Helpate de la ĝenerala kompanio, 26 lokaj fiŝ-kompanioj kaj internaciaj komercaj entreprenoj komencis oceanan fiŝadon. Ili starigis pli ol 60 akvoproduktaĵajn entreprenojn aŭ agentejojn en 30 landoj kaj regionoj. Nun la kompanio havas entute pli ol 1 000 fiŝŝipojn grandajn kaj malgrandajn, kiuj povas kapti 0.7 milionon da tunoj da fiŝoj ĉiujare. Sole en 1994 ĝi transportis en Ĉinion 40-50 specojn da akvoproduktaĵoj. Kaj krome, la akvoproduktaĵoj, kaptitaj kaj prilaboritaj en malproksimaj maroj, vendiĝas en Eŭropo, Afriko, Japanio kaj Usono.

La ĉinaj fiŝistoj aktive partoprenas internacian kunlaboron kaj konkurencon de fiŝado, defendas la bazajn rajtojn de Ĉinio en la monda fiŝkaptado, plifortigas la amikecon kun la triamondaj landoj kaj pere de konigo de teknikoj kaj laborigo de iliaj loĝantoj akcelas la ekonomian disvolviĝon de la koncernaj landoj.

Nun la Ĝenerala Ĉina Kompanio de Akvoproduktaĵoj sin okupas ne nur je fiŝkaptado, sed ankaŭ je alia entreprenado. Ĝi havas fridigajn tenejojn, prilaborajn fabrikojn kaj materialajn kompaniojn en havenoj de iuj landoj. Ĉio ĉi markas pli brilan perspektivon de la ĉina oceana fiŝado. ■

JE mencio pri fajencaĵoj oni certe rememoras la porcelanan urbon Jingdezhen de Jiangxi-provinco, Ĉinio. Fakte ankaŭ Cizhou-bakujoj de Hebei-provinco de Ĉinio ĝuas la famon. Sed, en la antikveco la bakujoj de Jingdezhen produktis porcelanaĵojn por la imperiestraj familioj, dum tiuj de Cizhou por la ordinaraĵoj. Antaŭ 7 000-8 000 jaroj, t.e. en la socio de matriarka klano, estis virinoj, kiuj ekbruligis fajron kaj bakis ruĝargilajn potojn kaj bovlojn.

Cizhou-bakujoj troviĝas en la urbetoj Guantai kaj Pengcheng de Cixian-gubernio, Hebei-provinco, Ĉinio. En Song-dinastio (960-1279) la gubernio dependis de la prefektujo Cizhou. Tiel estiĝis la samnomaj bakujoj.

Antaŭ 2 800 jaroj aperis volba bakujo kun fermita supro kaj kameno en la fundo. Tio ebligis al la flamo sin movi horizontale anstataŭ vertikale, tiel ke plilongiĝis la bakado en la bakujo kaj plialtiĝis la temperaturo en ĝi. Dank' al tio oni preparis kondiĉojn por baki porcelanaĵojn.

La argilaĵoj estas tralasivaj, krudaj, facile rompeblaj kaj malfacile purigeblaj. Antaŭ 1 600 jaroj Cizhou-anoj elbakis fajnajn, verde glazuritajn bovlojn, potojn, kruĉojn, tuĉfrotujojn kaj telerojn. Ili estas konataj kiel primitivaj porcelanaĵoj.

Cizhou-bakujoj atingis la kulminon de sia disvolviĝo en Song-dinastio. Tiam estis 12 specoj da porcelanaĵoj, inter kiuj la plej bona estis kolore glazurita porcelanaĵo.


Por fari kolore glazuritan porcelanaĵon necesas unue kovri la argilan rudimenton per kaolino kaj desegni nigra-brunajn florojn antaŭ ol glazuri kaj baki ĝin. La porcelanaĵo estas eleganta kaj bela.

Krom penike desegni nigra-brunajn florojn sur la fajenca rudimento, la artistoj beligas la porcelanaĵon per deskrapado de kaolino, duobla glazurado kaj gravurado de perloformaj cirkloj.

La tiel nomata deskrapado de kaolino estas gravuri vejnojn sur la rudimento tegita per kaolino kaj de-

Pri Cizhou-bakujoj

de PANG NAIYING



skrapi kaolinon ekster la rando de la vejnoj, antaŭ ol glazuri kaj baki ĝin. Post la deskrapado vidiĝas flava-bruna koloro de la rudimento kun blankaj vejnoj. Tio reliefigas la artaĵojn.

La tiel nomata duobla glazurado estas tegi la rudimenton per malhelbruna glazuro, gravuri sur ĝi vejnojn kaj deskrapati glazuron ekster la rando de la vejnoj. Kiam vidiĝas kaolino, oni tegas ĝin per travidebla glazuro. Post bakado la blanka kaolino de la pretigita porcelanaĵo plibeligas la malhelbrunan koloron sur la surfaco.

La tiel nomata glazurado de perloformaj cirkloj estas fari perloformajn cirklojn en la interspaco de vejnoj, farbi la konkavaĵojn de la vejnoj, glazuri kaj baki ilin. La porcelanaĵoj produktitaj en Guantai-bakujo surhavas orang-kolorajn perloformajn cirklojn kaj estas la plej ĉarmaj el la samspecaj objektoj.

Kiam oni rigardas porcelanaĵojn produktitajn en Cizhou-bakujoj, oni ne povas ne esti allogita de la vivetoso elspirita de la bildoj sur ili. La bildoj temas pri popola vivo, legendo, pejzaĝo, floroj, bestoj kaj infanoj, kaj plej multe pri ludantaj infanoj. Ili, viglaj kaj naivaj, ludas turbon, rajdas sur bambua ĉevalo,

hokas fiŝojn, paŝtas anasojn aŭ ludas kun koturnoj.

La laboristoj en Cizhou-bakujoj estis multe pli kreivaj ol tiuj en la bakujo por la imperiestra familio. Ni prenu porcelanan kapkusenon kiel ekzemplon. Ĝi havas formon de kuŝanta tigro kun malfermita faŭko kaj vosto etendiĝanta ĝis la antaŭa korpoparto kun nigra-brunaj strekoj. La kapkuseno surhavas desegnon de altaj bambuoj, kies folioj dissemiĝas sur la tuta surfaco. La bildo figuras la tigron ferocan kaj bravan, kio elspiras trajtojn de porcelanaĵoj de Cizhou-bakujoj.

Same kiel en Jingdezhen, en Cizhou oni ornamas siajn porcelanaĵojn per kaligrafiaĵoj aŭ teksto de poemo.

La porcelanaĵoj de Cizhou-bakujoj estis ne ŝatataj de la imperiestroj pro sia malsubtila materialo kaj ties kvalito. Tamen, ĝuste pro tio, ili plaĉis al la popolanoj. Tiu-tempe multaj bakujoj en norda Ĉinio produktis porcelanaĵojn, kiaj tiuj de Cizhou-bakujoj, ke formiĝis la Cizhou-stilo. Ankaŭ ceramikistoj de Japanio, Koreio, Tajlando kaj Vjetnamio lernis la teknikon de Cizhou-bakujoj. En 1300 reĝo de Tajlando venis al Pekino por montri sian respekton al imperiestro de Yuan-

dinastio. Li revenis al sia patrolando kun invititaj laboristoj de Cizhou-bakujoj. Nuntempe, en Koreio kaj Japanio ankoraŭ funkcias similaj porcelanaj bakujoj. En muzeoj de iuj eŭropaj landoj estas konservataj fajnaj produktaĵoj de Cizhou-bakujoj kaj en Japanio legeblas verkoj pri Cizhou-bakujoj dediĉitaj de japanaj fakuloj.

La porcelanaĵoj de Cizhou-bakujoj havis grandan debiton. Preskaŭ en ĉiu vilaĝo de Cizhou funkciis bakujo siatempe. Nun en la loko ankoraŭ vidiĝas amasoj da kar-

baj skorioj. Estis tro da bakskatoloj kaj vilaĝanoj konstruis murojn el ili kaj eĉ loĝdomojn kun apartaj trajtoj. Historia verko diras, ke siatempe en la prefektujo Cizhou estis multaj ceramikaĵaj butikoj kaj ĉaroj veturis tien kaj reen por transporti varojn kaj krudmaterialojn. Sur Fuyang-rivero trairanta la mezon de Cizhou veturis ŝipoj ŝargitaj per porcelanaĵoj.

La Cizhou-anoj rigardis la porcelanon plej grava en la vivo. En la nupto de ceramikistoj la geedzoj devis adorkliniĝi antaŭ la dio de baku-

jo; la novedzina doto devis enhavi paron da porcelanaj botelegoj; ludiĵoj devis esti porcelanaj katoj, hundoj kaj pupoj; kaj la 15-an de la dua monato kaj la 3-an de la tria monato laŭ la lunkalendaro, la ceramikistoj okazigis solenan ceremonion. Laŭdire, tiuj du tagoj estis naskiĝtagoj de la dio de bakujo kaj dio de fajro respektive. Ili iluminis la templon de dio de bakujo kaj tiun de dio de fajro. Ili faris incensadon kaj kultis la diojn, eksplodigante fajrokrakadon, donante festenon kaj ludante teatron, por benopeto.

Hodiaŭ Cizhou estas konata kiel unu el la sep grandaj produktaĵoj de porcelanaĵoj de Ĉinio. Tie oni produktas porcelanaĵojn por ĉiutaga vivo, konstruado, industrio, higieno, speciala bezono kaj ornamado, kun milo da specoj. La porcelanaĵoj flavaj, blankaj, malhelbluaj kaj nigraj montras la art-stilon de la modernaj Cizhou-bakujoj.

Por kulturaj teknikistoj oni funkciigas en la gubernio porcelanajn lernejojn, instituton kaj koleĝojn kaj produktas novtipajn porcelanaĵojn kunlabore kun koncernaj altaj lernejoj.

Nun, anstataŭ manlaboro en farado de porcelanaĵoj, oni funkciigas modernajn bakujojn regatajn per mikrokomputero. La bakujoj estas provizitaj per monde avangardaj formiloj, printatoroj kaj produktolinioj, unuarangaj en Ĉinio. Tamen, oni ankoraŭ uzas la primitivan teknikon por produkti la ŝatatajn porcelanaĵojn faritajn imite al tiuj de Song-dinastio. Antaŭ 38 jaroj pluraj boteloj de Cizhou-bakujoj, faritaj imite al tiuj de Song-dinastio, estis eksponataj en la Lepsika Foiro okazigita de GDR kaj atentataj de eksterlandaj artistoj. Ili diris: "La boteloj impresas ĉarme kaj modeste per siaj fortaj vejnoj de nigraj desegnoj, kompare al la eksponataj luksaj kaj subtilaj porcelanaĵoj." De tiam tiuspecaj porcelanaĵoj vendiĝas en aliaj landoj.

En 1979 aperis en la atendejo de la Pekina Flughaveno grandioza porcelana fresko sub la titolo Printempo de Sciencoj, kio denove altiris la atenton al Cizhou-bakujoj. De tiam Cizhou-anoj estas taskitaj fari porcelanajn freskojn por multaj urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj. ■



Porcelanaĵoj faritaj imite al tiuj de Song-dinastio

En kolora glazurado



Tabloteniso refoje impetas en Ĉinio

VESPERE de la 8-a de majo 1995, en la sporthalo de Tianjin 1 200 raportistoj ĉinaj kaj alilandaj per aparatoj kaj skribiloj registris la emocian tablotenis-finalon por la pokalo Swaythling. Rezulte, la Ĉina Vira Tablotenisa Teamo venkis la svedan per 3:2 kaj gajnis la teaman ĉampionecon post la Ĉina Virina Tablotenisa Teamo, kiu gajnis la teaman ĉampionecon antaŭ unu tago. En la sekvintaj tagoj diverslandaj tablotenisistoj faris pene-man lukton. Fine, la ĉinaj tablo-


tenisistoj refoje gajnis la 7 ĉampionecojn en la 43-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso post 1981. En la mondo la ĉinaj tablotenisaj teamoj estas unikaj, kiuj dufoje gajnis ĉiujn ĉampionecojn de la Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso kaj samtempe okupis la antaŭajn 4 lokojn en la unuopaj ludoj viraj kaj virinaj. Kompreneble, ilia kontribuo por antaŭenpuŝi tablotenison estis multe atentata de la mondo.

De la 60-aj jaroj la ĉinaj tablotenisistoj je rapida atako per vertikale tenata batilo regis super la

monda tereno de tabloteniso. La kontraŭdiroj, kiaj atako kaj defendo, rapideco kaj turniĝo, heredo kaj kreivo, pensigis la trejnistojn kaj sportistojn de la mondo. Por solvi la kontraŭdirojn ili senĉese esploris plej novajn teknikojn, ĝuste pro tio konkuris ne nur sportado, sed ankaŭ la imagipovo kaj kreivo de diverslandaj trejnistoj kaj sportistoj en la Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso.


De la fino de la 50-aj jaroj ĝis la mezo de la 80-aj jaroj la batiloj de ĉinaj tablotenisistoj, ŝajne, estis magiaĵo en la okuloj de alilandaj tablotenisistoj, ĉar ĉinoj kreis ĉirkaŭ 70% de la novaj teknikoj de tabloteniso, kiuj formis la malfacile konkereblan "Grandan Muron" en la monda tabloteniso. Vi-zaĝe al tio, eŭropaj tablotenisistoj, kiuj horizontale tenis la batilon, faris peneman trejniĝon en multaj jaroj. En la mezo de la 80-aj jaroj en la eŭropa tablotenisa tereno aperis Waldner, Persson, Lindh kaj aliaj eminentaj sportistoj. Ili lernis de la ĉinaj tablotenisistoj la teknikon ne nur pri ĉetabla rapida atako, sed ankaŭ pri la unuaj 3 batoj kaj serviro. Waldner per unu movo povis fari la pilkon turniĝanta en 7 malsamaj rapidecoj. Precipe eŭropaj tablotenisistoj disvolvis ludmanieron de manantaŭa lopa frapado al tiu de la manantaŭa kaj mandorsa. Post multjara trejniĝo la sveda teamo perfektigis la teknikon kaj fariĝis forta rivalo de la ĉina teamo en la 36-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso en 1983. Sed tiutempe la ĉina teamo apenaŭ havis novan tekni-

Ĉinaj tablotenisistoj gajnis la teaman ĉampionecon.





La sveda tablotenisisto Waldner



La ĉina tablotenisisto Ding Song

kon kaj kontraŭ la sveda teamo nur defendis sin per malnova ludarto. Fine en la 40-a Monda Tablotenisista Ĉampioneca Konkurso en 1989 la sveda teamo venkis la ĉinan per 5:0 kaj gajnis la pokalon Swaythling. La malsukceso de la ĉina teamo estis konsekvenca sekvo de ĝia postĝinta tekniko.

La sukceso de la sveda teamo kaj la allogo de la oraj medaloj de la Olimpikoj ege entuziasmigis eŭropajn sportistojn en renovigo de la tekniko. Sekve de tio, aperis Gatikn de Francio, Saive de Belgio kaj aliaj eminentaj tablotenisistoj, kiuj faris frapadon de pilko pli forta, pli rapida kaj pli turniĝanta. El tio rezultis, ke la ĉina teamo ne gajnis la pokalon Swaythling en sinsekvaj 6 jaroj.

La 43-a Monda Tablotenisista Ĉampioneca Konkurso estis la plej grandskala kaj plej intensa konkurso en la historio kaj montris la plej altan ludnivelon de la nuna tablotenisista tereno. En la ĉi-foja konkurso la ĉina vira teamo venkis ĉefe pro tio, ke ĝi konsistas el sportistoj, kiuj havas preskaŭ saman ludnivelon, diversajn ludmanierojn kaj evidentajn superaĵojn. Menciindas la ĉina tablotenisisto Ding Song. En la finalo de la teama konkurso lia ludmaniero konfuzis la svedan rivalon Karlson, ke li perdis la ludon. En la konkurso de la vira unuopa ludo Ding Song per 3:2 venkis la belgan sportiston Saive, kiu estis honorita kiel la plej elstara tablotenisisto en la mondo,

kaj en la konkurso por la antaŭaj 8 lokoj de la ludo Ding Song venkis sian rivalon Persson, kiu estis plej lerta en mandorsa lopa frapado. Ding Song faris grandan kontribuon por la ĉina teamo en la finalo de la teama konkurso. Oni diris, ke Ding Song sukcesis ne nur per sia ludarto, sed ankaŭ per siaj kuraĝo, persistemo kaj discipliniteco.

Unu el la karakterizaĵoj de la konkurso estis nombro da fortaj viraj teamoj. Evidente, la sveda teamo ankoraŭ estas unuaklasa en la mondo, kaj tiuj de Francio, Belgio kaj Germanio ne estas neglekteblaj. La franca teamo gajnis la teaman ĉampionecon de la Eŭropa Ĉampioneca Konkurso en 1994, la belga teamo estis la ĉampiono de la Eŭropa Superturniro de Tablotenisisto kaj la germana teamo gajnis la tablotenisan pokalon Landoj de Eŭropo. Preskaŭ samfortaj estas la ĉina kaj eŭropaj teamoj. En la ĉi-foja konkurso videblis, ke la ĉina teamo ankoraŭ ne multe superis la eŭropajn teamojn.

Ĝenerale dirite, Azio havas rimarkindan superecon en la virina tablotenisisto. La ĉina virina teamo hegemonias super la monda tablotenisista tereno kiel kutime. Ĝi 12-foje partoprenis en la Monda Tablotenisista Ĉampioneca Konkurso kaj 10-foje gajnis la teaman ĉampionecon. Se oni retrorigardos la 7-tagan virinan teaman konkurson ĉi-jare, oni povos facile trovi, ke la eŭropaj teamoj progresas rapide. La tablotenisistinoj de Ruman-

io kaj Svedio, reprezentantoj de eŭropaj tablotenisistinoj, tendencis ludi kiel tablotenisistoj. En la lastaj jaroj ĉinaj tablotenisistinoj plurfoje konkursis en Eŭropo kaj pro tio eŭropaj sportistinoj bone sciis la ludarton de la ĉinaj. Tion plene montris la konkurso, en kiu la rumana tablotenisistino Ciosu venkis la ĉinan sportistinon Qiao Hong, kiu okupis la duan lokon en la monda tereno de tablotenisisto. En la ĉi-foja konkurso videblis ankaŭ, ke la eŭropaj sportistinoj ankoraŭ ne sufiĉe maturiĝis nek tute perfektigis en ludarto, sed, kiam ili maturiĝos en ĝi, ili certe minacos la aziajn sportistinojn.

La koreaj tablotenisistinoj estas bone disciplinitaj psike, firmvojlaj kaj aktivaj en atako. El ili la 24-jara ĉefsportistino Park Kyung Ae, kiu vertikale tenis la batilon, iam venkis la ĉinan sportistinon Qiao Hong, kaj alia korea ĉefsportistino Park Hae Jung, kiu horizontale tenis la batilon, posedis originalajn ludmanierojn. Ili, energiplenaj kaj tre facilmovaj, minacos la ĉinajn sportistinojn en la venontaj jaroj.

Kvankam Deng Yaping, Qiao Hong kaj aliaj 2 ĉinaj tablotenisistinoj bone ludis en la konkurso, tamen la junaj ĉinaj sportistinoj estis eliminitaj en la unuopaj konkursoj. Necesas por ili multe sin hardi en psiko kaj tekniko. En la 26-aj Olimpikoj en Atlanta ili estos refoje provitaj. ■

LIAO JINGREN:

La ŝipisto sur Zijiang-rivero

(Novelo)

LA 614-kilometra torenta Zijiang-rivero havas multajn malprofundaĵojn. Ĝi fluas de la sudo al la nordo de la provinco Hunan, sin turnas orienten en la mezo de la provinco, kuniĝas kun la fino de Xiangjiang-rivero kaj fluas en Dongting-lagon.

Mia hejmo estis ĉe la norda bordo de la meza parto de Zijiang, kaj la familio vivtenis sin duone de montoj kaj duone de la rivero. Mia familio havis malgrandan parcelon kaj ŝipon. Ĉiujare, kiam la kamplaboroj ne estis tre multaj, ni kelkfoje faris longdistancon transportadon de drogherboj kaj aliaj lokaj produktaĵoj por ŝanĝi ilin kontraŭ mono en la gubernia urbo Yiyang, en la malsupra baseno de la rivero. Oni transdiris de generacio al generacio, ke surakva transportado donas grandan profiton, sed la fakto ne estis kiel dirita. En mia infaneco mia familio estis tre malriĉa kaj mi ofte sekvis miajn gepatrojn en transportado. Sed tiam la plej malproksima loko, kiun mi atin-

gis, estis Yiyang. Nia ŝipo ne povis veturi sur Dongting-lago kaj Yangzi-rivero, nur fortikaj kaj grandaj ŝipoj povis iri tie, ĉar arbitra uragano povis facile dispecigi kadukajn ŝipojn.

Estis serena tago. Ni estis ekirontaj. Mia patro firme staris kiel fera turo ĉe la rudro, dum mia patrino de tempo al tempo fiksas la puŝstangon sur la bordo por antaŭenirigi la ŝipon. "Horus", en ŝipista krio la verdaj montĉenoj post nia domo fariĝis pli kaj pli malproksimaj.

Ĉi-foje ni estis portantaj al Yiyang drogherbojn, kiujn la patro kolektis en primitiva arbaro en profunda montaro. Kiam li revenis hejmen, liaj vestoj estis tute detruitaj de branĉoj kaj dornoj, kaj sur la vestoj estis multaj nigre ruĝaj makuloj de sango kaj drogherbaj suktoj. Liaj manoj kaj piedoj estis vunditaj, kaj la sango jam koaguliĝis en la vundoj. Sed lia vizaĝo brile radiis de ĝojo kaj malofta kontento. Li diris, ke post vendo de la drogherboj li havos monon por ripari la lignan ŝipon atakitan de uragano kaj ondego dum la dekoj da jaroj. En

lia mieno mi legis, kvazaŭ li jam havus riparitan ŝipon kaj li veturus sur la senlima Dongting-lago kaj la torenta Yangzi-rivero.

Sed tio estis revo de mia patro.

Nia hejmo distancis de Yiyang preskaŭ 300 km, kaj la veturado estis plena de danĝero. Do nia malgranda kaduka ŝipo fariĝis pli malforta. Defalis la lako kaj oleaj ŝtopaĵoj en fendoj inter la tenonoj kaj mortezoj, kaj tie kaj ĉi tie videblis rustaj najloj.

Preterpasinte la Korvan Beĉkon, la ŝipo estis atingonta la Stelan Ĉielon. Tie la rifoj estis tiel multaj kiel steloj sur la ĉielo. Ĝuste tiam griziĝis la ĉielo, kaj plumbaj nuboj premis pli kaj pli peze. Subite paliĝis la vizaĝo de mia patro. Li diris fekvorton kaj je tio jam ekversigis pluvego. Tuj ŝveliĝis la rivero kaj furiozis la ondegoj. En teruro mi kaŝiĝis en kajuto kaj tremis laŭ la ondegoj.

Ni estis veturantaj sur longa malprofundaĵo kun abruptaj kurbiĝoj kaj ĉe la bordo estis sennombraj rifoj. Ne estis la ebleco haltigi la ŝipon aŭ albordiĝi. En la torenta pluvego mia patro jam ne povis klare vidi la direkton.

Maldekstren! Maldekstren!
Dekstren! Dekstren!

La ventego frapis kiel vipo, la pluvego batis kiel glavo. La patro senmove staris kiel masto kaj englutegis brandon, dum la patrino aplombe manipulis la rudron. Ĝuste kiam la ŝipo estis trapasonta la Stelan Ĉielon, aŭdiĝis obtuza krako kaj ekbalanciĝis la ŝipo — la fundo de la posta kajuto, kie ni dormis, estis truita de rifo. Mi estis terurita, kaj la patro fulmorapide levis min per piedo, senhezite rulis la litkovrilon kaj ŝtopis per ĝi la truon. Post tio li muĝe kriegis al mi: "Se vi ne volas morti, sidu sur la vato!"

Tiam la ŝipo jam venis al la tre mallarĝa valo krampita de apikaj rokmuĝoj. Muĝadis la

fluo, kvazaŭ laborus miloj da mueliloj. Knaradis la ŝipo. La vata litkovrilo jam estis depuŝita de akvokolono. Bategis mia koro. Mi firme enbrakigis la litkovrilon kaj intencis ŝtopi la truon per mia korpo. Sed la truo pli kaj pli larĝiĝis pro akvopuŝego. Mi ĵetis al la patro rigardon plenan de teruro kaj bedaŭro. Sed la patro jam ne povis atenti tion. Li koncentris sian tutan atenton sur la rudron, dum la patrino firme tenajlis la puŝtanganon kaj direktis ĝin rekte al la apika bordo en la fronto. Imagu, kiel terura sceno! Uragano levis akvon kaj muĝante ĵetis ĝin sur la nigran bordon. La bordo estis neŝancelebla, kaj la ondegoj rompiĝis en kunpuŝego kontraŭ la bordo... Fine okazis la neevitebla tragedio: la ŝipo senespere stariĝis kun la pruo supren kaj estis englutita de ondegoj. Mi firme fermis la okulojn kaj atendis, ke la Morto ĵetos min kontraŭ la klifon. Sed en tiu momento mi sentis, ke mi estis tenajlita de giganta mano. Mi leviĝis kaj malleviĝis en la mano kaj poste estis ĵetita de ĝi sur la bordon kiel mola pilko.

“Paĉjo!”

“Panjo!”

Mi raŭke vokis. Kaj sur la haŭlvoĵeto apud la malsupra parto de la rivero aliris nigra figuro de homo per malrapidaj kaj plumbaj paŝoj. Mi ne povis kredi, ke tiu estis la patro kun vundoj tra la tuta korpo, kaj sur lia dorso estis la mortinta patrino.

Mi ne havis la kuraĝon rigardi mian patrinon en la lumo de la pala luno. Ŝiaj kapo kaj korpo jam estis frakasitaj, sed ŝiaj manoj firme pungiĝis. Ĉu la animo de la patrino estis daŭriganta la batalon kontraŭ la pereiga torento kaj danĝeraj malprofundaĵoj? Mi ne havis la kuraĝon demandi al la patro, kie li trovis la korpon de la patrino. Sangis liaj lipoj, spasmis la muskoloj de liaj vangoj. Sed li ne veis, nek larmis. Li

nur senparole fosadis sur la sabla bordo. Mia patrino estis enterigita tie sur la bordo.

Draste maljuniĝis la patro. Reveninte hejmen, li, kiu neniam kredis je dio kaj fantomoj, bruligis incenson antaŭ la niĉo en la vestiblo kaj bruligis ankaŭ funebran papermonon. Li longe staris antaŭ la niĉo. Per tio li esprimis sian sopiron kaj bedaŭron.

Zijiang-rivero senŝanĝe fluas orienten. La akvo fluas en Dongting-lagon, en maron kaj transformiĝas en nubojn kaj pluvon. Tio ripetiĝas senĉese. Tio estas metabolo. Jes, Zijinag-rivero tage kaj nokte eksplikas la filozofion edifantan senkleran koron.

Mia patro estas vera viro. Ĉu

li povus deteni sin de la allogo de Zijiang-rivero? Ekscitite de brando, li denove vigliĝis. Li grandpaŝe iris al la bordo. Li diris, ke li iras por elekti ebenan lokon sur la bordo kaj konstrui tie novan ŝipon, kiu povos veturi sur Dongting-lago kaj Yangzi-rivero. Per tio li konsolos la animon de la forpasinto kaj kuraĝigos la posteulojn. Kiam la patro estis parolanta pri sia plano, lia vizaĝo ruĝe radiis, la brusto ondetis. Mi sciis, ke li estis ekscitita de la akra brando, de sia sango, de la dolorego pro la perdo de la edzino, de la filozofio de Zijiang-rivero. Rigardante la figuron de mia foriranta patro, mi ekhavis naivan imagon: eble la ekscito faros mian patron kupra statuo.

Do mi estas posteulo de la kupra statuo. ■


Elĉinigita de **Wang Shirong**



EKONOMIO

● Ventoelekto estas rigardata kiel grava konsistiga parto de la elektra industrio de Ĉinio, kaj laŭ plano, en la jaro 2000 la kapacito de la ventoelektraj generatoroj de Ĉinio estos miliono da kilovattoj.

Ĉinio komencis esplori ventoelektron en la 70-aj jaroj por doni elektron al la ĉiutaga vivo kaj produktado de terkulturistoj kaj paŝtistoj en la foraj landlimaj regionoj, kiujn oni malfacile povis provizi per elektro. La proponitaj maŝinoj estas malgrandaj generatoroj de 100-1 000 vattoj. Ĝis nun 140 000 generatoroj estis akceptitaj.



Ventoelektrejo en Xinjiang

TURISMO

● Konstruado de la ĝardeno Wanlüyuan estis komencita en Haikou, ĉefurbo de Hainan-provinco.

La ĝardeno kovros 72 hektarojn, kaj tie oni gazonigos areon de 300 000 kvadrataj metroj kaj

La ĝardeno
Wanlüyuan
konstruata



plantos 20 000 arbojn. La ĝardeno kun maro kiel la fono havos multajn tropikajn ornamajn vegetalojn.

● La Vinbera Tago okazis en Turpan de Xinjiang. Turpan situas ĉe rando de dezerto, kaj pro varmega klimato ĝi estas nomata "Fajrolando". Sed ĝi estas ankaŭ fama oazo, kie bone kreskas vinberoj kaj Hami-melonoj. La loĝantoj estas uĝuroj, kiuj tre ŝatas kanti kaj danci. Tial la Vinbera Tago fariĝis unu el la tre ŝatataj programeroj en "Turismo de Nacimalplimultaj Moroj de Ĉinio '95" aranĝita de turismaj administracioj de Ĉinio.

NATURPROTEKTADO

● Por informiĝi pri la frajejo de angiloj, fama ĉina oceanobiologo Wu Baoling kaj liaj kamaradoj faris en kvar sezonoj 15 fojojn da navigado en totala distanco de 79 500 marmejloj en la Nigratajda Regiono de la Orienta Ĉina Maro, la japana Nigratajda Regiono, la regiono de la Nordekvatora Fluo kaj la nordokcidenta Pacifiko, kaj en marto 1993 akiris 80 angilajn ovojn. Analizo konstatis, ke 19 el ili estas de japanaj angiloj. Krome la esplorantoj konfirmis, ke okcidente de la Marianaj Insuloj kaj norde de la Nordekvatora Fluo estas frajejo de japanaj angiloj. La trovo kaj konfirmo de frajejo de japanaj angiloj ludos gravan rolon en protekto kaj utiligo de valoraj maraj estaĵoj.

● Ĉinoj unuafoje kaptis frankolinon viva en Ebian-gubernio de Sichuan-provinco kaj liberigis ĝin. Tia birdo estas unu el la kvar pereontaj raraj animaloj proklamitaj de la internacia organizo de protekto de sovaĝaj animaloj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La Disvolva Centro sub la Ĉina Instituto de

Intelekta Komputero sukcesis elfari grandan paralelan komputeran sistemon "Shuguang 1 000". Ĉi tiu estas unuaklasa superkomputero por grandskala inĝenieria kalkulado. Ĝia kulmina rapideco estas 2.5 miliardoj da fojoj en sekundo. Ĝia skalo por postulata solvo superis tiun de eksterlandaj samspecaj komputeroj. Ĝi estas nova mejloŝtono en farado de altkvalita komputero de Ĉinio.

- Antaŭ cent jaroj oni trovis, ke legumenacoj havas ĉe la radiko radikonodajn bakteriojn, kiuj povas kondensigi nitrogenon. Pro tio fabo, arakido kaj aliaj legumenacoj donas bonan rikolton sen sterado.

Antaŭ nelonge esplora grupo el sciencistoj de Ĉinio, Britio, Aŭstralio kaj Meksikio trovis du novajn specojn da nitroĝeno-kondensigaj baciloj kun kreskantaj sur la tropikaj legumenacoj sesbanio (*Sesbania cannabina*) kaj gledisio (*Gleditsia*). La sciencistoj inokulis la bacilojn al tritiko, rizo, maizo kaj kolzo kaj rezulte de tio aperis eksterordinara fenomeno de greftiĝo de vegetaloj je la baciloj. Fakuloj kredis, ke vasta aplikado de tiu tekniko tra la mondo alportos neimageblan utilon al la homaro.

MEDICINO

- La 43-jara ŝoforo Gou Xiaodong estis en komata stato jam 5 jarojn pro trafika akcidento. Antaŭ nelonge li akceptis 3-monatan kuracadon en konvaleskejo de Heilongjiang-provinco, reakiris la konscion kaj povis iri sub alies helpo. Li estis tiu el la rekonsciitaj komatantoj en la konvaleskejo, kiu komatis plej longe.

- Nekompleta statistiko raportis, ke en Ĉinio oni jam faris 17 000 operaciojn de rompitaĵoj kaj fingroj. La plej juna operaciito estis 10-monata kaj la plej aĝa — 74-jara. La replantebleco iris de brako al fingropinto. Krome oni jam povas replanti ĉiujn dek fingrojn samtempe derompitajn kaj replanti piedfingran pecon al difektita fingro.

- Post 8-jara penado multe progresis la otorinolaringologia fako de la hospitalo Xiehe de Pekino en esplorado de redono de parolpovo al operaciitoj de laringoektomio. Oni inokulis al 61 operaciitoj de laringoektomio anasbegan silicikaŭĉukan sontubon, kaj 54 el ili jam povis klare paroli.


- Lastatempe Ĉinio eldonis la unuajn 10 volumojn de "Kolekto de Antikvaj Ĉinmedicinaj Verkoj Unuekzempleraj". La kolekto estis kompilita de dekoj da kompetentaj ĉinmedicinaj kuracistoj kaj farmakologoj kaj aŭtoritataj bibliotekistoj. Ili faris grandskalan enketadon pri ununuraj ekzempleroj de la antikvaj ĉinmedicinaj verkoj en la tuta lando,

elektis el ili 300 plej altnivelajn kaj kompilis ilin en kolekton. La kolekto temas pri la ĉina medicino, farmakologio, akupunkturo, kaŭterizo, ĉigong-o kaj aliaj sanprotektaj metodoj.

KULTURO

- Antaŭ nelonge okazis en Pekino ekspozicio de pentraĵoj de fama singapura pentristo s-ro Tang Jinhao.

Liaj pentraĵoj sub la titolo "Lakta Vojo" faritaj per ŝprucigo de koloraj gumoj estas imagoriĉaj kaj novstilaj. Personoj de kultura, belarta kaj ĵurnalisma rondoj alte taksis liajn verkojn.



Pentraĵo farita de Tang Jinhao

ARKEOLOGIO

- Esploristo Zhao Xijin de la Ĉina Paleovertebrula kaj Paleoantropologia Instituto faris ekspertizon al pli ol 700 pecoj de fosilio de Guizhou-dinosaŭro eltrovitaj en la urbo Xingyi de Guizhou-provinco kaj konkludis, ke Xingyi de Guizhou estas sola loko, kie oni trovis samtempe fosiliajn rampulojn kaj fiŝojn de la triaso antaŭ 240 milionoj da jaroj. Guizhou-dinosaŭro ekzistis pli frue ol ordinara dinosaŭroj, kaj ĝia fosilio estas tre valora por esploro pri la frua mara fosilio. Estas tre malofte, ke oni trovis en la sama stratumo de unu loko de Guizhou tiom da fosiliaj rampuloj kaj fiŝoj, rilate la koncernajn marajn stratumojn de la mondo. Tio estas tre grava por akademia esplorado.

MATERIALOJ POR ĈIN-MEDICINA FARMACIO

La ĝenerala esploro pri la materialoj por ĉin-medicina farmacio, finita komence de la kuranta jaro, montris, ke en Ĉinio estas 12 807 tiaj materialoj, inkluzive de oficinalaj vegetaloj, animaloj kaj mineraloj. Tio pruvis, ke Ĉinio estas unu el la landoj riĉaj je naturaj drogoj.

La ĝenerala esploro montris ankaŭ, ke la fontoj de ĉin-medicinaj drogoj multas en sudokcidenta Ĉinio kaj malmultas en nordorienta Ĉinio. En la esplorado oni trovis novajn drogojn, unuafoje klasifikis la regionojn de ĉin-medicinaj drogoj, solvis surbaze de nova elirpunkto la problemon kiel plifortigi produktadon de ĉin-medicinaj drogoj kaj kiel science direkti ĝin.

En la esplorado oni kolektis proksimume 100 000 popolajn preskribojn kaj efikajn receptojn, sistemigis materialojn por ĉin-medicina farmacio de Ĉinio, starigis datenbankon de teknikaj dosieroj kaj kompilis librojn pri ĉin-medicinaj drogoj, kiaj "Fontoj de Ĉin-medicinaj Drogoj", "Skizo de Ĉin-medicinaj Drogoj", "Regionoj de Ĉin-medicinaj Drogoj", "Atlaso de Fontoj de Ĉin-medicinaj Drogoj", "Ĉin-medicinaj Drogoj Ofte Uzataj" kaj "Popolaj Preskriboj kaj Efikaj Receptoj de Ĉinio".

TAKLIMAKAN — "MARO DE ESPERO"

Taklimakan meze de Tarim-baseno en suda Xinjiang estas unu el la famaj dezertoj de la mondo. Ĝi allogas per sia vasteco kaj mistereco. En la pasinta centoj da jaroj multaj ĉinaj kaj alilandaj esplorantoj penadis por koni ĝian veran aspekton, sed ili ĉiuj malsukcesis. Ili diris, ke Taklimakan estas "maro de morto", el kiu oni neniel povas eliri.

Pli ol cent ĉinaj sciencistoj faris kvarjaran esploron pri la dezerto Taklimakan. Per abundo da materialoj kaj novaj esploroj ili konkludis, ke Taklimakan estos "maro de espero" por la tuta homaro.

Taklimakan estas kompare riĉa je akvo kaj la pluvokvanto estas multe pli granda ol la supozita. Tie estas preskaŭ ĉiaj veteroj. En printempo kaj somero nebulas, hajlas kaj tondras kaj en aŭtuno kaj vintro prujnas kaj neĝas. 24 riveroj enfluas en la dezerton kaj la totala rezervo de

subtera akvo estas 8 000 miliardoj da kubmetroj, egale al la totala pluvokvanto de la terglobo en 70 jaroj. Kaj krome la akvoentena tavolo de la dezerto estas dika, tralasiva kaj malprofunda. La tieaj 73 specoj da kreskaĵoj kun 53 genroj kaj 20 familioj vivas de subtera akvo. Sur la dezerto prosperas 500 000 hektaroj da poploj (*Popular diversifolia*) kaj la areo kaj biokvanto de glicirizo, tamariko kaj apocino estas pli grandaj ol tiuj en aliaj lokoj de Ĉinio. En la kavoj sur la dezerto prosperas fragmitoj. En la loko vivas 32 specoj da bestoj, 189 specoj da birdoj, 13 specoj da rampuloj kaj 38 specoj da fiŝoj. Ili konsistigas duonon de la totala nombro de la specoj de bestoj en Xinjiang.

Sub la dezerto etendiĝas vasta olea stratumo. Estas konstatite, ke la olehava areo en Taklimakan estas trioble pli granda, ol tiu de Daqing-olekampoj. Laŭ nekompleta statistiko, la nafta rezervo atingis 15-18 miliardojn da tunoj kaj la rezervo de naturgaso 700-800 milionojn da kubmetroj. El tio videblas, ke Taklimakan estas trezorejo.

POR PROTEKTI BLANKNAĜILAJN DELFENOJN

La Azia Komisiono de Dolĉakvaj Delfenoj, fondita en 1994, havis sian unuan kunvenon fine de la jaro. Diverslandaj fakuloj opiniis, ke la rezervejo de blanknaĝilaj delfenoj en Tian'ezhou, Shishou-gubernio, Hubei-provinco, Ĉinio, estas plej bona loko por protekti blanknaĝilajn delfenojn. Necesas kiel eble plej frue transloki la blanknaĝilajn delfenojn el Yangzi-rivero en la rezervejon.

Ĉina membro de la komisiono konigis land-nivelan rezervejon de blanknaĝilaj delfenoj en Ĉinio. Depost 1980 oni dufoje translokis sume dek delfenojn el Yangzi-rivero en ĝin. Ili vivas bone en la rezervejo kaj ricevis kvin delfenidojn.

Tri el la kvar specoj de dolĉakvaj delfenoj de la mondo vivas en Azio. La blanknaĝilaj delfenoj vivas ekskluzive en Yangzi-rivero. Proksimigantaj al perejo, ili estas difinitaj de Ĉinio kiel unuarangaj bestoj protektataj de la ŝtato. En 1986 la Internacia Unio por Protekti la Naturon kaj Naturajn Fontojn enlistigis ilin en la nomliston de la duaj 12 pereontaj estaĵoj de la mondo.

Batalo kontraŭ jodomanko

SCIENCAJ esploroj montris, ke por homoj jodo estas unu el la nemalhaveblaj elementoj. Jodomanko estas ĉefa kaŭzo de intelekta malsano de homoj. Tamen laŭ la raporto de la 43-a Monda Konferenco pri Sano en 1990, miliardo da loĝantoj en minimume 130 landoj vivas en la medio de jodomanko. Tio estas grava socia problemo, kiu rilatas al eŭgeniko, plialtigo de nacia kvalito kaj disvolvigo de socia ekonomio, kaj estas zorgata de la tuta mondo.

Septembre de 1990 ĉefministroj de 71 landoj subskribis la "Agadplano de monda manifestacio por vivo, protekto kaj progreso de infanoj". En la nomo de sia lando, la ĉina ĉefministro promesis al la mondo: Antaŭ la jaro 2000, jodomanko-malsano malaperos en Ĉinio.

De tiam per televido, radiodisaŭdigo kaj ĵurnaloj, la ĉinoj multe informiĝas pri danĝero de jodomanko. Dommastrinoj ekaĉetis jodan salon, nerimarkite ŝanĝiĝis la homa koncepto pri jodomanko.

La 3-an de majo 1994 novaĵanoncanto de la Ministerio pri Publika Sano de la Ĉina Popola Respubliko deklaris en Pekino, ke la 5-a de majo de 1995 kaj la sekvaj jaroj estu "Tutlanda tago por preventi kaj kuraci jodomankomalsanon", kaj antaŭ la jarfino de 1995, Ĉinio aplikos jodan kuirsalon tutlande.

Tio ja estis kuraĝa promeso, ĉar laŭ la nova normo difinita de Monda San-organizo, al jodomanka regiono apartenas preskaŭ la tuta Ĉinio. La tero kaj akvo de multaj regionoj en Ĉinio estas jodomankaj kaj la tieaj greno, legomoj, viando kaj ovoĝoj enhavas mal-

multe da jodo. Jodomankomalsano facile atakas la loĝantojn, kiuj longe vivas en tia medio.

Fakte, jam en la 50-aj jaroj Ĉinio faris grandskalan preventadon kaj kuracadon de endemio kaŭzita de jodomanko. En 1979 ĝi publikigis "Provizoraj metodoj por preventi kaj kuraci lokan strumon per aldono de jodo al kuirsalon" kaj rikoltis bonan efikon. 19 provincoj, kie troviĝas tia endemio, atingis la difinitan normon kaj 25 milionoj da malsanuloj resaniĝis.

Sed en la pasintaj jaroj, denove pliigis la morbokvanto de jodomanko-malsano. La nombro de malsanuloj atingis 440 mil en 1993, sed en 1992 nur 60 mil. La Loĝantaro en la regionoj, suferantaj de la malsano, pliigis de 375 milionoj en la fino de la 70-aj jaroj al 425 milionoj nuntempe. La kaŭzo estis, ke granda kvanto da senjoda salo estis vendata, tio malordigis la normalan merkaton de kuirsalon. Multaj homoj manĝis salon senjodan kaj nerimarkite malsaniĝis je jodomanko.

La ŝtato difinis, ke kuirsalon estas varo serioze kontrolata. La registaro senpage liveras jodon bezonatan de kuirsalon al la salofarejoj, kiuj devas ricevi permeson de loka administracio pri saloentrepreno por vendi ĉiun tunon da kuirsalon. Tamen, iuj profitemaj entreprenistoj blinde pliigis la produktokvanton, evitante kontrolon



En pakejo de joda salo

de la koncerna administracio, kaj mem disvendis la senjodan salon, kio estis tre malutila al la loĝantoj.

Laŭ raporto de la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Salo, Pekino estas jodomanka regiono, tamen tie la vendokvanto de joda salo en 1994 reduktiĝis je 50 mil tunoj, kiu konsistigis 30% de jara vendokvanto. Jodomanka regiono en Ji'an de Jiangxi-provinco havas 4.25 milionojn da loĝantoj, kiuj bezonas 25.5 mil tunojn da joda salo ĉiujare, tamen en 1992 tie nur 18.6 mil tunoj da salo estis venditaj, tio signifas, ke pli ol 27% de la loĝantoj ne povis manĝi jodan salon. Samtempe la senjoda salo plimultiĝis en 1992 je 78.1% kompare kun tiu en la pasinta jaro. La urbo Xiangfan de Hubei-provinco estas unu el la ĉefaj regionoj jodomankaj, kie en 1992 nur 20 mil tunoj da joda salo estis venditaj, dum la senjoda salo vendiĝis je 50 mil tunoj.

Kontraŭ la serioza situacio la ĉina registaro alprenis serion da rimedoj: La administracioj pri industrio, komerco, publika sano, negoco kaj teknikokontrolo faris komunan ordonon — ĉesigi transporton de senjoda salo en la jodomankajn regionojn; pliefikigi la administradon pri merkato de kuirsalo. La planizita kaj financa administracioj donas apartan krediton al la laboro por preventi kaj kuraci jodomanko-malsanon. Tion ankaŭ la Tutlanda Virina Federacio kaj Ŝtata Eduka Komisiono vaste propagandas inter virinoj kaj infanoj; la medikamentaj departementoj aranĝis produkton de jodido en fabrikoj. En 1994, oni ĉesigis funkciadon de ĉ. 600 netaŭgaj salfarejoj en la tuta lando.

En la batalo kontraŭ jodomanko, Ĉinio ricevis krediton de Monda Banko por reformi ekipaĵojn en produkto kaj pakumo de joda salo, kio bezonas entute 125 milionojn da usonaj dolaroj, el kiuj 27 milionoj venas de kredito de Monda Banko. Respondeculo de la Ĝenerala Federacio de Malpezindustrio de Ĉinio diris, ke kiam la plano efektiviĝos, la nombro de jodo-

produktejoj reduktiĝos de 1 800 al 100, kiuj situos ekskluzive en grandaj bazoj de kuirsal-farejoj, kaj por garantii la kvaliton la joda salo estos pakumita senescepte en saketo.

Por bonordigi la kuirsalan merkaton kaj sukcese administri ĝian vendadon, la koncerna departemento publikigis serion da reguloj, kiuj klare diras, ke vendado de senjoda kuirsalo estas rigardata kiel tiu de falsaj kaj malbonkvalitaj medikamentoj, kaj estos punataj. La produktantoj kaj vendantoj de kuirsalo nepre devas havi licencon. Kaj plie la ŝtato difinis, ke kuirsalo estas salo joda, kies entreprenadon respondecas la registaro, kaj oni malpermesas senlicencajn fabrikojn produkti ĝin. Antaŭ la fino de 1995, populariĝos joda salo en la tuta lando.

La registaroj de diversaj lokoj de Ĉinio donis grandan atenton al la batalo kontraŭ salo senjoda. Hunan-provinco decidis senpage liveri jodan salon kaj jodan oleopilolon al 330 mil loĝantoj en 27 malriĉaj gubernioj, kie troviĝas grava jodomanko-malsano. La provinca registaro postulis, ke la polico, administracio de industrio kaj komerco kaj saloentrepreno kune bonordigu la merkaton kaj en ĉiu vilaĝo difinu kumulan kontrolanton pri joda salo. Sciencistoj de Guizhou-provinco faris multan laboron por preventi kaj kuraci jodomanko-malsanon. La provinco donis grandan atenton al liverado de joda salo kaj joda oleo-pilolo. Tiu laboro rikoltis bonan efikon — jodomanko-malsano atakis neniun el la infanoj, kiuj naskiĝis post 1978, kiam la provinco komencis preventi kaj kuraci la malsanon.

En Ĉinio la popularigado de joda salo signifas plimultiigi la jaran liverkvanton de joda salo de 5 milionoj da tunoj al 8 milionoj da tunoj. Al jodo-aldonado al kuirsalo la ĉina registaro ĉiam donas subvencion, kiu plimultiĝis je 46% en 1995 kompare kun tiu en 1994. ■

GALERIO

Kantanta pupo el argilo

Teksto de RUAN HAIYING

Tiu ĉi pupo el la Orienta Han-dinastio (25-220) estas majstraĵo ĝuanta renomon tra la historio, sed anonima.

La pupo havas sur la kapo turbanon kaj ĉapeton, ornamon sur la frunto. Liaj brusto kaj ventro estas nudaj, sur lia maldekstra brako estas braceleto kaj en lia maldekstra mano estas tamburo, dum lia dekstra mano estas levita kaj fraponta la tamburon. Lia dekstra piedo estas etendita, dum lia maldekstra fleksita. Liaj viglaj brovoj, lia larĝe malfermita buŝo, lia komika mieno... ĉio vivece fiksas la figuron en la plej interesa momento. La verko montras la altan nivelon de skulpturo de la Orienta Han-dinastio.





Bondeziroj al la 45-jariĝo de EPĈ (Ĉinstila pentraĵo)

de DONG CHENSHENG

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第九期

(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2

